

**PREĜOSEMAJNO
POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ**

La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo
(kp. 2 Kor 5, 14-20)

18.-25.01.2017

IKUE
Romo/Zagrebo, januaro 2017

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Antonio *De Salvo*, Guidonia, Italio
- Bernard *Schwaiger*, Arnstadt, Germanio
- Bogusław *Sobol*, Milanówek, Pollando
- Daniel *Chevalier*, Ecquevilly, Francio
- Doris *Legat*, Dornbirn, Aŭstrio
- Giovanni *Daminelli*, Sesto S. Giovanni, Italio
- Laura *Gentili*, Arezzo, Italio
- Marija *Belošević*, Zagreb, Kroatio
- Mike *Leon*, Lower Hutt, Novzelando
- Milton *Lacerda*, Santos, Brazilo
- Paola Birgit *Giommoni*, Arezzo, Italio
- Pavol *Petrik*, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij *Prutko*, Kievo, Ukrainio
- Veronika *Kirsch*, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz *Rigoti Dos Anjos*, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Reviziis: Antonio *De Salvo*

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija *Belošević*

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
Via di Porta Fabbrica 15
IT-00165 ROMA RM, Italio

ikue@ikue.org

ikue.reto@gmail.com

www.ikue.org

www.esperokatolika.org

Fejsbuko de IKUE: goo.gl/Vv21BD

groups.yahoo.com/group/ikue/

www.radio-vatikana-esperanto.org

www.fontoj.net

Estimataj,

En la manoj la kvinan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de dek sesopo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco: dekdu landoj, kvar kontinentoj!

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memori al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero, Lillo kaj Nitro kaj ĉiujtagaj preĝoj dum la Ekumenaj E-kongresoj en Trento kaj Strasburgo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo.

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević,
vicprezidantino de IKUE

PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ 2017

La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo

(kp. 2 Kor 5, 14-20)

18.-25.01.2017

BIBLIA TEKSTO POR LA JARO 2017

2Kor 5,14-20

Ĉar la amo de Kristo nin devigas; ĉar ni juĝas jene, ke ĉar unu mortis pro ĉiuj, tial ĉiuj mortis; kaj li mortis pro ĉiuj, por ke la vivantoj jam vivu ne por si mem, sed por tiu, kiu pro ili mortis kaj releviĝis. Tial ni de nun konas neniun laŭkarne; eĉ kvankam ni konis Kriston laŭkarne, tamen ni ne plu lin tiel konas. Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj. Sed ĉio estas de Dio, kiu repacigis nin al Si mem per Kristo kaj donis al ni la administradon de la repacigo; nome, ke Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si, ne alkalkulante al ili la kulpojn, kaj komisiis al ni la vorton repacigan. Ni do estas ambasadoroj pro Kristo, kvazaŭ Dio per ni petadus; ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio.

TEOLOGIA-PAŜTISTA ENKONDUKO

La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo

(kp. 2 Kor 5, 14-20)

Germanio: la lando de la Luterana Reformacio.

En 1517 Marteno Lutero montris sian maltrankvilon pro tio, kion li konsideris misuzoj en la eklezio de sia tempo, diskonigante siajn 95 tezojn. La jaro 2017 signas la kvincentan datrevenon de tiu ŝlosila evento ene de la reformaj movadoj, kiu signis la vivon de la okcidenta eklezio dum diversaj jarcentoj. Ĉi tiu evento konsistigis malpacan temon dum la tuta historio de la rilatoj inter la eklezioj en Germanio ĝis la nunaj tagoj. La Germana Evangelia Eklezio (EKD) komencis programi ĉi tiun datrevenon ekde la jaro 2008, enfokusigante ĉiun jaron sur apartan aspekton de la Reformacio, ekzemple, la Reformacio kaj la politiko, la Reformacio kaj la formado. EKD eĉ invitis la ekumenajn partnerojn, je diversaj niveloj, por ke ili kontribuu komenti la eventon de 2017.

Post ampleksaj pridiskutoj, kelkfoje malfacilaj, la eklezioj en Germanio akordiĝis pri la fakto, ke la plej bona maniero por ekumene memori la eventon de la Reformacio estas fari el ĝi „Celebradon de Kristo” (*Christusfest*). Fakte, se la emfazo estas metita sur Jesuon Kriston kaj en lian elaĉetan agadon, kiel centron de la kristana fido, tiam ĉiuj ekumenaj partneroj de EKD (katolikoj, ortodoksuloj, baptistoj, metodistoj, menonitoj kaj aliaj) povos partopreni en la festado de la datreveno.

Prikonsidere de la fakto, ke la historio de la Reformacio estis signita de doloraj disiĝoj, temas pri tre rimarkinda akiraĵo. La Luterana-katolika Komisiono pri la unuiĝo laboris senlace por atingi la komunan komprenon de la memorigo. Ĝia grava raporto *De la konflikto al la komuneco* agnoskas, ke ambaŭ tradicioj alproksimiĝas al ĉi tiu datreveno dum ekumena epoko, kun la rezultoj de kvindekjara dialogo ĉe sia aktivo, kaj kun renovigita kompreno de sia historio kaj de sia teologio. Distingante inter la polemikaj aspektoj kaj la teologiaj elanoj de la Reformacio, la katolikoj estas nun kapablaj aŭskulti la defion de Lutero al la nuntempa Eklezio, agnoskante lin kiel “atestanton de la evangelio” (*De la konflikto al la komuneco* n. 29). Tiele, post jarcentoj de reciprokaj kondamnoj kaj insultoj, en 2017 la kristanoj – luteranoj kaj katolikoj – unuafoje, memorigos kune la komenciĝon de la Reformacio.

De ĉi tiu akordo, kaj konsidere de la pli vasta ekumena kunteksto, elstaras la forta temo de la ĉi-jara Preĝsemajno por la unuiĝo de la kristanoj: „La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo” (kp. 2 Kor 5, 14-20).

La konsilio de la eklezioj en Germanio (ACK) kaj la datreveno de la Reformacio

La Konsilio de la eklezioj en Germanio proponis multe da projektoj por memori la jaron 1517. Unu el ili, titolita: „*Discover Anew the Bible's Treasures*” (*Remalkovri la trezorojn de la Biblio*) naskis etan publikaĵon, en kiu ĉiuj eklezioj ACK-anaj priskribis sian aliron al la Biblio, konsidere la gravecon, kiun Marteno Lutero atribuis al la Biblio. ACK krome estigis simblan „pilgrimadon” en la diversajn ekleziojn membrojn de Wittenberg; ĉiu komunumo vizitita esprimis kaj celebris sian apartan manieron rilatiĝi kun la Biblio. Dum Aprilo 2015, ACK organizis ankaŭ prelegon titolitan: „*Irreparably Divided? Blessed Renewal? – 500 Years of Reformation in Various Ecumenical Perspectives*” (*Ĉu disiĝo neriparebla? aŭ benata renoviĝo? – 500 jaroj de Reformacio laŭ la malsamaj ekumenaj perspektivoj*), kies aktoj estis publikigitaj.

En la kunteksto de ĉi tiu datreveno, laŭ instigo de la Ekumena konsilio de la eklezioj, la Konsilio de la eklezioj en Germanio (ACK), akceptis la taskon redakti la tekston de la materialo de la Preĝsemajno por la unuiĝo de la kristanoj de la jaro 2017. Komisiono formita de dek reprezentantoj de diversaj eklezioj kunsidis trifoje en la jardo 2014-2015 por redakti la tekston. Oni alprenis apartan atenton por la preparo de la teksto de la komuna liturgio de la Semajno. La materialo celas utili al la ĝenerala celo de la Preĝsemajno, kaj samtempe memorigi la luteranan Reformacion.

La temo de la Preĝsemajno por la unuiĝo de la kristanoj 2017

Kiam la germana nacia organiza Komitato kunvenis en aŭtuno de 2014, tuj evidentiĝis, ke la materialo por la Preĝsemajno 2017 devos enteni du fokusajn punktojn: unuflanke devos ĉeesti celebrado de la amo kaj graco de Dio, la „justigo de la homaro nur per graco”, kiu respegulas la kernan postulon de la eklezioj markitaj de la Reformacio de Marteno Lutero. Aliflanke la materialo devis ankaŭ agnoski la doloron de la sekva profunda disiĝo, kiu signis la ekleziojn, elvokante per nomo la kulpojn, kaj prezentante la eblecojn por paŝi al la repaciĝo.

Fine estis la apostola instigo de papo Francisko. *Evangelii Gaudium* (La ĝojo de la Evangelio), kiu sugestis la ĉi-jaran temon per la citado, je la paragrafo n. 9, „La amo de Kristo pelas nin”. Per ĉi tiu versiklo (2 Kor 5,14) elprenita de la kunteksto de la tuta kvina ĉapitro de la *Dua Letero al la Korintanoj*, la Germana komitato formulis la temon de la Preĝsemajno 2017.

La biblia teksto: 2 Korintanoj 5, 14-20

La biblia teksto emfazas, ke la repaciĝo estas donaco, kiu alvenas de Dio, por la tuta kreitaro. „Dio repacigis la mondon al si pere de Kristo: li pardonas al la homoj iliajn pekojn kaj konfidis al ni la anoncon de la repaciĝo” (vd 19). Kiel rezulto de la agado de Dio, la homo, repacigita en Kristo, estas vokata siavice proklami ĉi tiun repacigon per vortoj kaj agoj: „La amo de Kristo pelas nin”. „Do ni estas ambasadoroj senditaj de Kristo, kaj tio estas kvazaŭ Dio mem instigus pere de ni. Mi petegas vin je la nomo de Kristo: lasu vin repaciĝi kun Dio” (vd 20). La teksto substrekas, ke ĉi tiu repaciĝo ne estas sen sufer-ofero. Jesuo donis sian vivon; li mortis por ĉiuj. La ambasadoroj de la repaciĝo, sammaniere, estas alvokataj, en lia nomo, doni sian vivon. Ili ne plu vivas por si mem: ili vivas por Tiu, kiu mortis por ili.

Tagaj meditoj kaj diservo

La biblia teksto (2 Kor 5,14-12) estas bazo ankaŭ por la tagaj meditoj, kiuj sekvas la teologiajn komprenojn de la unuopaj versikloj laŭ la ĉi-malsupraj pecoj:

Tago 1-a: Unu mortis por ĉiuj

Tago 2-a: „... ne plu vivi por si mem“

Tago 3-a: „... ne plu sole laŭ homaj mezursistemoj“

Tago 4-a: La malnovaĵoj forpasis

Tago 5-a: Se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo

Tago 6-a: Dio repacigis kun si la mondon

Tago 7-a: La servo de repaciĝo

Tago 8-a: Repaciĝintaj al Dio

En la diservo festatas, ke Dio pere de Kristo repacigas la mondon kun si. Sed por tio nepras nia kulpokonfeso antaŭ ol ĉerpi el la fonto de dia pardono kune, en proklamo de la Vorto kaj en promeso de pardono. Nur tiamaniere ni kapablos atesti en la mondo pri la eblo de repaciĝo.

La amo de Kristo admonas nin esti atestantoj

La amo de Kristo admonas nin preĝadi kaj samtempe transpaŝi preĝadon por la unueco de la kristanoj. Komunumoj kaj eklezioj bezonas la dian virton de repaciĝo, ĉar ĝi estas fonto de vivo. Ili bezonas ĝin tamen antaŭ ĉio kiel bazon por komuna atesto en la mondo: „Ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi mein sendis.“ (Joh 17,21)

Bezonas la mondo ambasadorojn de repaciĝoj por malkonstrui muroj, konstrui pontojn, fari pacon kaj malfermi vivspacojn en la nomo de Li, kiu repacigas nin kaj Dio: Jesuo Kristo. Lia Sankta Spirito montras la vojon, kiel repaciĝo en Lia nomo povas iĝi hodiaŭ.

En la 2015-a jaro, kiam estiĝis tiu ĉi teksto, multaj homoj kaj kristanaj komunumoj en Germanio ekzemplodonis pri repaciĝo: ricevante gasteme multajn homojn, kiuj rifuĝis el Sirio, Afganio kaj Eritreo kiel ankaŭ el landoj de Okcidenta Balkanio. Iliaj helpopreteco kaj imponaj agadoj kontraŭ ksenofobio estis klara signo pri repaciĝo en la germana socio. Kiel ambasadoroj repaciĝaj la eklezioj engaĝiĝas por doni al rifuĝintoj patrujon kaj samtempe plibonigi la cirkonstancojn en ties originaj landoj. Kiel konkreta helpo tiel estas bezonata ankaŭ la komuna preĝado pri repaciĝo kaj paco por doni aparte al homoj en forkuro kaj subpremo esperon kaj optimismon.

Abundu en la diservo kaj en la preĝosemajno pri la unueco de la kristanoj en 2017 la fonto de la de Dio donacita repaciĝo por ke homoj trovu pacon kaj pontojn estu konstruitaj. Peligu sin homoj kaj eklezioj fare de la krista amo je adaj repaciga vivo kaj murotransiro.

La materialojn preparis:

- Prelato d-ro Eberhard Amon (DBK – Germana episkopara konferenco romkatolika)
- Pastoro Bernd Densky (ACK, Ligo de Evangeliaj-liberekleziaj komunumoj en Germanio/ Baptistoj)
- Pastorino Leonie Grüning (EKD – Evangelia Eklezio en Germanio)
- Pastorino Annette Gruschwitz (EmK – Evangelia-metodista Eklezio en Germanio)
- Ĉefpastro Constantin Miron (OBKD – Ortodoksa episkopara konferenco en Germanio)
- Pastoro Scott Morrison (SELK – Memstara Evangelia-luterana Eklezio)
- d-ino Dagmar Stoltmann-Lukas (DBK - Germana episkopara konferenco romkatolika)
- Pastoro Jan-Henry Wanink (Komunumo reformita malnova)
- Pastorino Allison Werner Hoenen (EKD kaj VELKD Evangelia Eklezio en Germanio kaj Unuiĝinta evangelia-luterana Eklezio en Germanio)
- Ruth Raab-Zerger (AMG – Laborgrupo de menonitaj komunumoj en Germanio)

EKUMENA DISERVO

Enkonduko al la diservo

Repaciĝo – La amo de Kristo nin devigas (komp. 2Kor 5,14-20)

Memorfesto de la 500-a Datreveno de la Reformacio

La Eklezioj de Germanio decidis rememori tiun ĉi datrevenon per *Christusfest* (ekumena diservo de Kristo). La Reformacio estis okazo por renoviga fokuso sur la savo pere de la graco, tra la kredo je Jesuo Kristo. Ni ĝojas pro Dia savo centrita en la kruco de Kristo, kiu superas dividojn kaj altiras al unuiĝo. En tiu ĉi diservo ni malferme konfesas kaj pardonpetas pri la pekoj de divido, kiuj sekvis la Reformacion. La diservo celebros Kriston kaj liajn repaciĝajn agojn, kiuj tuŝas la koron de la dividitaj kristanoj, por ke ili fariĝu ambasadoroj de Kristo kiel servantoj de repaciĝo.

La enhavoj de la diservo

La temo „Repaciĝo – la amo de Kristo nin devigas” instigas nin celebri la nenuligeblan repaciĝon kiun ni ricevis el la kredo je Jesuo Kristo. La amo de Kristo fariĝas la impulsema forto kiu kunportas nin krom niaj dividoj laŭ la direkto de repaciĝaj agoj.

Per psalmoj kaj kantoj ni kunvenas en la nomo de Jesuo, laŭdante Dion pro liaj mirindaj faroj. Ni konfesas niajn pekojn de divido kaj pardonpetas. La proklamo de la Vorto lumigas la repacigan agadon de Kristo, kiel tiu kiu „mortis pro ĉiuj” (v. 14). Fideluloj respondas al tiu bona novaĝo akceptante la alvokon esti servantoj de repaciĝo.

Simbolaj agoj dum la diservo

La muro

Je 1989 okazis la falo de Berlina Muro, kiu komenciĝis per la Movado de Preĝo por la Paco en la Germana Demokratia Respubliko (GDR – orienta Germanio), kie homoj metis kandelojn en fenestroj kaj pordoj kaj preĝis por libereco. Horst Sindermann, membro de la estraro de la GDR ĝis 1989, rimarkis ke „ni estis projektintaj ĉion. Ni estis pretaj por ĉio, escepte por kandeloj kaj preĝoj”. Tial la divido de la kristanoj kaj la repaciĝo kiun ni serĉas reprezentigas pere de la konstruo kaj falo de muro. Tio povas esti simbolo de espero por kiu ajn situacio kie divido ŝajnas nesuperebla. Tiel, la konstruo de simbola muro en la konfeso de la pekoj, la videbla ĉeesto de tiu muro dum la proklamo de la Vorto kaj, fine, la malmunto de tiu muro por formi krucon kiel simbolo de espero, havigas al ni kuraĝon alfronti tiujn terurajn dividojn kaj ilin superi per Dia helpo.

Gvidilo/materialo: Konstruante kaj faligante Muron

„Divido ŝuldita al nia peko”: post malgranda enkonduko kelkaj membroj de la kunvenantaro konstruos apartigan muron, kiu reprezentos la pekojn kaj la dividon kiun ni konfesas. La muro restas ekspoziciita dum la diservo ĝis la parto titolita „Respondi per la kredo – vivi en repaciĝo”. Tie la ŝtonoj removiĝos el la muro kaj metiĝos laŭ formo de kruco.

Depende de la grandeco de la diserva spaco, jenaj materialoj estos necesaj por tiu simbola agado: 12 skatoloj samgrandaj (ekzemple: ŝuskatoloj aŭ por transportado de aliaj materialoj), kovritaj per pakpapero por formi la „ŝtonojn”. Je la fronta flanko de ĉiu skatolo, oni metas etiketon (manko de amo; malamo kaj malestimo; falsaj akuzoj; diferencigo; persekutado; rompo de komuneco; netoleremo; religiaj militoj; dividoj; trouzo de povo; izoleco; orgojlo). Laŭmezure ke ĉiu peko menciigis, la ŝtono metiĝas por formi la muron. Post momento de

silento, tiu kiu metas de la ŝtonojn faras pardonpeton, al kiu la kunvenantaro respondas „Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj”.

Post la proklamo de la Vorto de Dio, post la fino de la homilio, venas preĝo por la repaciĝo. Laŭmezure ke la muro malkonstruiĝas kaj la ŝtonoj metiĝas laŭ la formo de kruco, oni kantas kanton de repaciĝo aŭ glorhimnon por la kruco.

Por celebroy en malgrandaj grupoj, liturgia alternativo povas esti pligrandigi la spacon aŭ anstataŭigi la muron per personaj atestoj. Tiuj atestoj dum la unua parto devas pritrakti situaciojn dolorigajn al aliaj. Dum la dua parto, kiu rilatiĝas al la respondo de kredo, povas rekontiĝi historioj pri repaciĝo kaj kuracaj agoj.

Kandeloj

Post la Kredkonfeso, oni oferas kvar propetajn preĝojn. Post ĉiu peto, tri homoj lumigas siajn kandelojn el la centra fonto de lumo (Paska kandelego, ekzemple) kaj restas starantaj ĉirkaŭ la kruco, ĝis la parto kiu titoliĝas “komisio kiu venas de Kristo”. Post tiu parto, la dekdu homoj portas la lumon tra la kunvenantaro ĝis ĉiu partoprenanto havas lumigita sian kandelon. La diservo finiĝas per beno kaj forsendo.

Gvidilo

G: Gvidanto

A: Asembleo (Kunvenantaro)

L: Leganto

I. Kunigitaj en la nomo de Jesuo

Himnoj por la kunveno (*selektiĝos laŭ ĉiu loko*)

Eniro procesie kun la Biblio

Malfermo

G: En la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito

A: Amen

G: Ke la graco kaj paco de Dio, kiu repacigis nin al Si mem per Kristo, estu kun vi ĉiuj
(2 Kor 5,18)

A: Kaj kun vi ankaŭ

Enkondukaj vortoj

G: Karaj gefratoj en Kristo, ĉijare multaj kristanoj kaj Eklezioj memorigos la datrevenon de la Reformacio. Sankta Paŭlo rememorigas nin ke Dio repacigis nin al Si mem per Kristo, kaj ke la amo de Kristo instigas nin esti ministroj de la repaciĝo. Ni adoru kaj laŭdu Dion kune, en la unueco de la Sankta Spirito.

Psalmo 98 (*kantade*) **aŭ laŭda himno**

Kantu al la Eternulo novan kanton,

Ĉar miraklojn Li faris;

Helpis Lin Lia dekstra mano kaj Lia sankta brako.

La Eternulo aperigis Sian savon;

Antaŭ la okuloj de la popoloj Li malkaŝis Sian justecon.

Li memoras Sian bonecon kaj Sian fidelecon al la domo de Izrael.

Vidis ĉiuj finoj de la tero la helpon de nia Dio.

Ĝoje krii al la Eternulo la tuta tero;

Kantu, gloru, kaj muziku.
Muziku al la Eternulo per harpo,
Per harpo kaj per sonoj de psalmo.
Per trumpetoj kaj per sono de korno
Ĝoje krii antaŭ la Reĝo, la Eternulo.

Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,
La mondo kaj ĝiaj loĝantoj.
La riveroj plaŭdu per la manoj,
La montoj kune kantu ĝoje,
Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas,
Por juĝi la teron;
Li juĝos la mondon kun justeco
Kaj la popolojn kun vereco.

II. Disigitaj pro niaj pekoj (konfeso)

Invito al konfeso

G: Dum la irado de la historio, ekestis multaj movadoj por renoviĝo en la Eklezio, kiu ĉiam bezonas pli profundan konvertiĝon al ĝia Majstro, Jesuo Kristo. Kelkfoje tiuj movadoj kondukis al nedezirindaj dividoj. Tiu ĉi fakto kontraŭdiras kion Jesuo petas de sia Patro laŭ Johano 17,23: “ke ili perfektigu en unu, por ke la mondo sciu ke Vi min sendis, kaj ke Vi amis ilin kiel Vi amis min”. Ni konfesu niajn pekojn kaj preĝu por pardono kaj sanigo de la vundoj rezultantaj de niaj dividoj. Dum ni mencias tiujn pekojn, ni vidos kiel ili fariĝas muro kiu dividas nin.

Silento

G: Ni preĝu: Dio kaj ĉiela Patro, ni venis al Vi en la nomo de Jesuo. Ni spertis renoviĝon per Via Sankta Spirito, kaj eĉ tiel ni konstruis murojn kiuj dividas nin, murojn kiuj malhelpas la komunecon kaj la unuecon. Nun ni alportas antaŭ Vi la ŝtonojn per kiuj ni konstruis niajn murojn, kaj ni petas pardonon kaj resaniĝon.

A: Amen.

Laŭmezure kiel ĉiu peko nomiĝas, la respondeca ŝtono alportiĝas por konstrui muron. Post silenta momento, la portanto de la ŝtono (L) preĝas por pardono, kaj la komunumo respondas: “pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj”.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “manko da amo”.

La ŝtono kun la etiketo “manko da amo” metiĝas.

L1: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro ĉiuj okazaĵoj, kiam ni mankis al amo. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “malamo kaj malŝato”.

La ŝtono kun la etiketo “malamo kaj malŝato” metiĝas.

L2: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro nia malamo kaj malŝato unuj kun aliaj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “malvera akuziĝo”.

La ŝtono kun la etiketo “malvera akuziĝo” metiĝas.

L3: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro denunco kaj malvera akuziĝo unuj al aliaj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “diferencigo”.

Ŝtono kun etiketo “diferencigo” metiĝas.

L4: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro ĉiuj formoj de antaŭjuĝoj kaj diferencigoj unuj al aliaj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

Kantada respondo: Sinjoro, pardonu nin.

Lokaj komisionoj elektas siajn proprajn kantadajn respondojn.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “persekutado”.

Ŝtono kun la etiketo “persekutado” metiĝas.

L5: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro la persekutado kaj torturado unuj al aliaj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “rompo de la kuneco”.

Ŝtono kun etiketo “rompo de la kuneco” metiĝas.

L6: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro la daŭrigo de la rompo de la kuneco inter niaj Eklezioj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “netoleremo”.

Ŝtono kun la etiketo “netoleremo” metiĝas.

L7: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro la ekzilado de niaj fratoj kaj fratinoj ĉe nia naskiĝolando, ofta en la pasinteco, kaj pro la agoj de religia netoleremo de niaj tagoj. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas la “religiaj militoj”.

Ŝtono kun la etiketo “religiaj militoj” metiĝas.

L8: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro ĉiuj militoj, kiujn ni kaŭzas unuj kontraŭ la aliaj en via nomo. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

Respondo kantade: Sinjoro, pardonu nin.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “divido”.

Ŝtono kun etiketo “divido” metiĝas.

L9: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro la fakto ke ni travivas nian kristanan vivon divide unuj kun aliaj, kaj elvojigitaj de nia komuna alvoko por la prizorgo de tuta kreitaĵo. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono estas “trouzo de povo”.

Ŝtono kun etiketo “trouzo de povo” metiĝas.

L 10: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro nia trouzo de povo. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “izoliteco”.

Ŝtono kun etiketo “izoliteco” metiĝas.

L 11: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro la fojoj kiam ni izoligiĝis de niaj kristanaj gefratoj kaj de la komunumoj kie ni vivas. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

G: Unu ŝtono en nia muro estas “orgojlo”.

Ŝtono kun la etiketo “orgojlo” metiĝas.

L 12: Ĉiograca Dio, la amo de Kristo instigas nin peti pardonon pro nia orgojlo. Humile ni petas:

A: Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

Respondo kantade: Sinjoro, pardonu nin.

G: Ni preĝu: Sinjoro, nia Dio, rigardu tiun ĉi muron kiun ni konstruis, kiu disigas nin de Vi kaj unujn de aliaj inter ni. Pardonu niajn pekojn. Sanigu nin. Helpu nin venki ĉiujn murojn de divido kaj ŝanĝu nin en unu en Vi.

A: Amen.

Himno/Kanto/Muziko por meditado

III. Ni repaciĝu al Dio – Ni aŭskultu Dian Vorton

Unua legaĵo: Jeh 36, 25-27

Kaj Mi aspergos vin per pura akvo, kaj vi puriĝos de ĉiuj viaj malpuraĵoj, kaj de ĉiuj viaj idoloj Mi purigos vin. Kaj Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin; Mi eligos el via korpo la ŝtonan koron, kaj Mi donos al vi koron karnan. Kaj Mian spiriton Mi metos en vin, kaj Mi faros, ke vi agados laŭ Miaj leĝoj, kaj Miajn ordonojn vi observados kaj plenumados. Kaj vi loĝos en la lando, kiun Mi donis al viaj patroj; kaj vi estos Mia popolo, kaj Mi estos via Dio. Kaj Mi liberigos vin de ĉiuj viaj malpuraĵoj; Mi vokos la grenon kaj multigos ĝin, kaj Mi ne venigos sur vin malsaton. Mi multigos la fruktojn de la arboj kaj la produktaĵojn de la kampo, por ke vi ne plu havu antaŭ la nacioj honton pri malsato. Tiam vi rememoros vian malbonan konduton kaj viajn nebonajn agojn, kaj vi faros al vi mem riproĉojn pro viaj malbonaĵoj kaj pro viaj abomenindaĵoj. Ne pro vi Mi agas, diras la Sinjoro, la Eternulo; tion vi sciis. Hontu kaj ruĝiĝu pri via konduto, ho domo de Izrael!

Responda Psalmo: Psa 18, 25-32 (kantade)

Ĥoro: Mi amas vin, Sinjoro, mian forton.

L: La Eternulo rekompensis min laŭ mia justeco,

Laŭ la pureco de miaj manoj antaŭ Liaj okuloj.

Kun favorkorulo vi estas favorkora,

Kun piulo Vi estas pia,

Kun purulo Vi agas laŭ lia pureco,

Kaj kun la maliculo laŭ lia maliceco.

Ĥoro: Mi amas vin, Sinjoro, mian forton.

L: Ĉar humilan popolon Vi helpas,

Sed altajn okulojn Vi malaltigas.

Ĉar Vi lumigas mian lumilon;

La Eternulo, mia Dio, lumigas mian mallumon.

Ĉar kun Vi mi forkuriga militistaron,

Kaj kun mia Dio mi transsaltas muron.

Ĥoro: Mi amas vin, Sinjoro, mian forton.

L: La vojo de Dio estas perfekta;

La parolo de la Eternulo estas tute pura;

Li estas ŝildo por ĉiuj, kiuj Lin fidas.

Ĉar kiu estas Dio, krom la Eternulo?

Kaj kiu estas Roko, krom nia Dio?

Ĥoro: Mi amas vin, Sinjoro, mian forton.

Dua legaĵo: 2 Kor 5, 14-20

Ĉar la amo de Kristo nin devigas; ĉar ni juĝas jene, ke ĉar unu mortis pro ĉiuj, tial ĉiuj mortis; kaj li mortis pro ĉiuj, por ke la vivantoj jam vivu ne por si mem, sed por tiu, kiu pro ili mortis kaj releviĝis. Tial ni de nun konas neniun laŭkarne; eĉ kvankam ni konis Kriston laŭkarne, tamen ni ne plu lin tiel konas. Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj. Sed ĉio estas de Dio, kiu repacigis nin al Si mem per Kristo kaj donis al ni la administradon de la repacigo; nome, ke Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si, ne alkalkulante al ili la kulpojn, kaj komisiis al ni la vorton repacigan. Ni do estas ambasadoroj pro Kristo, kvazaŭ Dio per ni petadus; ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio.

Haleluja (*kantado*)

Legajo el Evangelio: Luk 15, 11-24

Kaj li diris: Unu viro havis du filojn; kaj la pli juna diris al sia patro: Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj li dividis inter ili siajn vivrimedojn. Kaj post ne multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, forvojaĝis al malproksima lando; kaj tie li disperdis sian havon per diboĉa vivado. Kaj kiam li jam elspezis ĉion, forta malsato okazis en tiu lando, kaj li komencis havi mankon. Kaj li iris, kaj aliĝis al unu el la loĝantoj de tiu lando; kaj ĉi tiu lin sendis sur siajn kampojn, por paŝti porkojn. Kaj li deziris plenigi sian ventron per la karboj, kiujn la porkoj manĝis; kaj neniun donis al li. Sed reveninte al si, li diris: Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde, sed mi ĉi tie pereas de malsato! Mi leviĝos, kaj iros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi; mi jam ne meritas esti nomata via filo; faru min kiel unu el viaj dungitoj. Kaj li leviĝis, kaj iris al sia patro. Sed kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis kaj kortuŝiĝis, kaj kurinte, falis sur lian kolon kaj lin kisadis. Kaj la filo diris al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne meritas esti nomata via filo. Kaj diris la patro al siaj servistoj: Alportu rapide la ĉefan robon, kaj lin vestu, kaj metu ringon sur lian manon kaj ŝuojn sur liajn piedojn; kaj alportu la grasigitan bovidon kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj; ĉar ĉi tiu mia filo estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita. Kaj ili komencis esti gajaj.

Haleluja (*kantado*)

Homilio

IV. Respondo laŭ la kredo – Ni vivadu repacigitaj.

Dum la muro malkonstruiĝas kaj la ŝtonoj metiĝas krucforme, oni ekkantas kanton de repaciĝo aŭ himnon por glorado de la kruco.

G: Ni preĝu: Malavara Dio kaj Ĉiela Patro, ni aŭskultadis Vian Vorton, kiu diras ke Vi repacigis nin al Vi pere de Via Filo, Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Per la povo de la Sankta Spirito, ŝanĝu niajn ŝtonajn korojn. Helpu nin agadi kiel servantoj de repacigo, kaj sanigu la dividojn de niaj Eklezioj, tiel ke ni povu pli bone servi kiel iloj de Via paco en la mondo.

A:Amen.

La Paco

G: La paco de la Sinjoro estu ĉiam kun vi.

Ni oferu unuj al aliaj signon de paco.

Himno/Kanto

(Kolekto de oferaĵoj)

V. Respondo laŭ la kredo – Ni proklamu la repacigon

Kredo (ekumena)

Propetaj preĝoj

*Post ĉiu peto, tri homoj bruligas siajn kandelojn ĉe centra fonto de lumo –
ekzemple: Paska kandelego – kaj staras ĉirkaŭ la kruco, ĝis la parto
kiu havas titolon “Komisio kiu venas de Kristo”.*

L 1: Ĉiopova Dio, Vi sendis Vian Filon Jesuo Kristo repacigi al Vi la mondon. Ni laŭdas Vin pro tiuj kiujn Vi sendis laŭ la povo de la Sankta Spirito por prediki la Evangelion al la nacioj. Ni dankas pro la fakto ke ni havas ĉie en la mondo komunumon de amo, kiu estas unuigita per preĝoj kaj laboroj, kaj ĉar ĉie Viaj servantoj proklamas Vian Nomon. Ke Via Spirito veku en tuta komunumo malsaton kaj soifon de unueco en Via amo. Ni preĝu al Sinjoro:

Respondo (parole aŭ kante): Sinjoro, aŭskultu nian preĝon.

Kun sufiĉa tempo por ke la komisiitoj povu bruligi siajn kandelojn ĉe la Paska kandelego.

L 2: Malavara Dio, ni preĝas por niaj Eklezioj. Plenigu ilin per tuta vero kaj paco. Kie la kredo estas difektita, purigu ĝin; kie la homoj devojiĝas, redirektigu iliajn vojojn; kie fiaskas la proklamado de la Evangelio, transformu ilin; kie ili atestas rekte, fortigu ilin; kie ili multe necesbezonas, donu kion ili bezonas; kaj kie ili estas dividitaj, restarigu la unuiĝon. Ni preĝu al la Sinjoro:

Respondo (parole aŭ kante): Sinjoro, aŭskultu nian preĝon.

Kun sufiĉa tempo por ke la komisiitoj povos bruligi siajn kandelojn ĉe la Paska kandelego.

L 3: Dio Kreinto, vi faris nin laŭ Via bildo kaj elaĉetis nin per Jesuo Kristo, via Filo. Rigardu kompateme Vian tutan homan familion; forigu la arogantecon kaj malamon kiuj infektas niajn korojn; malkonstruu la murojn kiuj dividas nin; unuigu nin per ligiloj de amo. Kaj, eĉ en niaj malfortoj, faru ke ni efektivigu Viajn projektojn sur la tero, tiel ke ĉiuj popoloj kaj nacioj povu Vin servi harmonie ĉirkaŭ Via ĉiela trono. Ni preĝu al la Sinjoro:

Respondo (parole aŭ kante): Sinjoro, aŭskultu nian preĝon.

Kun sufiĉa tempo por ke la komisiitoj povos bruligi siajn kandelojn ĉe la Paska kandelego.

L 4: Sankta Spirito, donanto de la Vivo, ni estas kreitaj por esti plenaj en Vi kaj por partigi tiun ĉi vivon sur la tero kun niaj gefratoj. Veku en ĉiuj el ni Vian kompaton kaj amon. Donu al ni forton kaj kuraĝon labori por justeco kie ni estos, krei pacon en niaj familioj, komforti malsanulojn kaj mortantojn, kaj partigi ĉion kion ni havas kun la bezonantoj de la necesajoj. Por la aliformiĝo de ĉiu homa koro, ni preĝu al la Sinjoro:

Respondo (parole aŭ kante): *Sinjoro, aŭskultu nian preĝon.*

Kun sufiĉa tempo por ke la komisiitoj povos bruligi siajn kandelojn ĉe la Paska kandelego.

Preĝo de la Sinjoro (Patro Nia, ekumena traduko)

Patro Nia, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo. Venu via regno. Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Ĉar Via estas la regno, kaj la potenco kaj la gloro. Amen.

VI. Ambasadoroj de Kristo – Ministroj de repacigo

La dekdu pasigas la kandelojn tra tuta kunveno, ĝis ĉiu homo havas lumigitan kandelon.

G: Lumigita kandelo estas simbolo profunde homa: ĝi lumigas mallumon, kreas homan varmon, sekurecon kaj komunumon. Ĝi simbolas Kriston, lumon de la mondo. Kiel ambasadoroj de Kristo ni portas tiun ĉi lumon al la mondo, al la malhelaj lokoj kie disputoj, malakordoj kaj dividoj malhelpas nian kunan ateston. Ke la lumo de Kristo instigu repacigon en niaj pensoj, vortoj kaj agoj.

Ricevu la Lumon de Kristo kaj portu ĝin al la malhelaj partoj de nia mondo! Estu servantoj de repacigo! Estu ambasadoroj de Kristo!

Beno kaj sendado

G: Al Vi ni petegas, tre kompatema Dio:

Ke ĉiuj serĉantaj repacigon sentu Vian helpon, por ke ili povu proklami Viajn grandegajn agojn de Amo! Tion ĉi ni petas en la nomo de Via Filo, Jesuo Kristo nia Sinjoro.

A: Amen.

G: Ke la beno de la Ĉiopova Dio, Patro kaj Filo kaj Sankta Spirito, venu sur vin kaj restu kun vi por ĉiam.

A: Amen.

G: Iru en la paco de Dio!

A: Danke al Dio!

Himno/Kanto: elektita de la loka planada komitato

Tago 1-a: Unu mortis pro ĉiuj (2 Kor 5,14)

Legajoj

Jes 53,4-12 *Lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon*

Vere, niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis; sed ni opiniis lin plagita, frapita de Dio, kaj humiligita. Tamen li estis vundita pro niaj pekoj, disprenita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis. Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon; kaj la Eternulo ĵetis sur lin la kulpon de ni ĉiuj. Li estis turmentata, tamen li humiliĝis kaj ne malfermis sian buŝon; kiel ŝafido kondukata al buĉo kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj, li ne malfermis sian buŝon. De malliberigo kaj de juĝo li estas prenita; kaj pri lia generacio kiu rakontos? De sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita, pro la kulpo de mia popolo li estas frapita. Inter malbonaguloj oni donis al li tombon, inter riĉuloj post lia morto, kvankam li ne faris maljustaĵon kaj trompo ne estis en lia buŝo. Sed la Eternulo volis tiel lin turmenti. Kiam lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon, li vidos idaron, li longe vivos, kaj la intenco de la Eternulo sukcesos per lia mano. La laborfrukton de sia animo li vidos, kaj satiĝos. Per konigo de li Mia virtulo-servanto virtigos multajn; kaj iliajn pekojn li portos sur si. Tial Mi donos al li multajn kiel lian parton, kaj la potenculojn li dividos kiel akiron; pro tio, ke li elmetis sian animon al la morto kaj estis alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur si la pekon de multaj kaj petis por la krimuloj.

Psa 118,1.14-29 *Dio ne donas min al la morto*

Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona;

Ĉar eterna estas Lia boneco.

La Eternulo estas mia forto kaj mia kanto,

Kaj Li fariĝis mia savo.

La voĉo de triumfo kaj de saviĝo sonas en la tendoj de la virtuloj:

La dekstra mano de la Eternulo faras heroaĵojn;

La dekstra mano de la Eternulo estas alte,

La dekstra mano de la Eternulo faras heroaĵojn.

Mi ne mortos, sed mi vivos,

Kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo.

Per forta puno punadis min la Eternulo,

Sed al la morto Li min ne donis.

Malfermu al mi la pordegojn de la vero;

Mi iros tra ili, mi gloros la Eternulon.

Jen estas la pordego de la Eternulo;

Virtuloj iras tra ĝi.

Mi dankas Vin,

Ĉar Vi aŭskultis min kaj fariĝis mia savo.

Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj,

Fariĝis ŝtono bazangula.

De la Eternulo ĉi tio fariĝis,

Ĝi estas miraklo en niaj okuloj.

Ĉi tiun tagon faris la Eternulo;

Ni ĝoju kaj gajiĝu en ĝi.

Ho Eternulo, helpu!

Ho Eternulo, sukcesigu!

Estu benata tiu, kiu venas en la nomo de la Eternulo!

Ni benas vin el la domo de la Eternulo.

La Eternulo estas Dio, kaj Li lumas al ni.

Aranĝu la festan procesion kun branĉoj ĝis la kornoj de la altaro.

Vi estas mia Dio, kaj mi Vin gloras;

Mia Dio, Vin mi altigas.
Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona;
Ĉar eterna estas Lia boneco.

1 Joh 2,1-2 *Kristo mortis pro ĉiuj*

Infanetoj miaj, ĉi tion mi skribas al vi, por ke vi ne peku. Kaj se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan; kaj li estas repacigo pro niaj pekoj, kaj ne sole pro niaj, sed ankaŭ pro la tuta mondo.

Joh 15,13-17 *Demeti sian vivon pro siaj amikoj*

Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian.

Komento

Kiam Paŭlo iĝis kristano, li ricevis radikale novan komprenon: Unu mortis pro ĉiuj. Jesuo ne nur mortis pro sia propra popolo kaj pro tiuj, kiuj akceptis sian instruadon. Li mortis pro ĉiuj homoj el ĉiuj tempoj, tio signifas: pro ĉiuj, kiuj vivis iam ajn, nun aŭ venonte. Multaj kristanoj donis en la paso de la jarcentoj siajn vivojn pro fideleco al la evangelio. Unu el ili estis la franciskano Maksimiliano Kolbe, kiu estis tenita en la koncentrejo Auŝvico. Tie li iris libervole al la morto kaj savis tielmaniere la vivon de kunarestito.

Unu mortis pro ĉiuj, tial ĉiuj mortis (2 Kor 5,14). Kiam ni mortas kun Kristo, tiam nia ĝisnuna vivmaniero ĉesas, kaj ni eniras novan ekzistmanieron: vivon en abundo, en kio ni jam hodiaŭ spertas sekurecon, konfidon kaj pardonon; vivon, kio eĉ post la morto ne iras al la vakuo. Tio estas la nova vivo en Dio. Ekde tiu konkludo Paŭlo sentas sin devigita per la amo de Kristo, proklami la evangelion pri la repaciĝo kun Dio.

La eklezioj plenumas kune la ordonon prediki la evangelion. Sed pro niaj skismoj ni devas demandi nin, ĉu nia atesto pri la repacigo estas kredinda.

Demandoj

- Kion signifas tio: diri, ke Jesuo mortis pro ĉiuj?
- Dietrich Bonhoeffer skribas: „Mi estas frato por la aliulo per tio, kion Jesuo faris por mi kaj en mi. La aliulo iĝis frato por mi per tio, kion Jesuo Kristo faris por li kaj en li.“ (Kuna Vivo, Munkeno 171980, p. 16-17) – Kion signifas tion por mia rilatado al la aliuloj?
- Kiaj konsekvencoj sekvas el tio koncerne la ekumenismon kaj la interreligian dialogon?

Preĝo

Dio, Nia Patro,
vi donis nin en Jesuo la Unun,
kiu mortis pro ĉiuj.
Li travivis nian vivon kaj mortis nian morton.
Vi akceptis lian oferon
kaj relevigis lin al nova vivo kun vi.
Lasu nin, kiuj mortis kun li, unuiĝi per la Sankta Spirito
kaj donu al ni vivon en la abundo de via dia ĉeesto
nun kaj eterne. Amen.

Tago 2-a: „... ne plu vivi por si mem“ (2 Kor 5,15)

Legajoj

Miĥ 6,6-8 *Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona*

Kun kio mi povas stariĝi antaŭ la Eternulo, kliniĝi antaŭ Dio en la alto? ĉu mi stariĝu antaŭ Li kun bruloferoj, kun jaraĝaj bovidoj? Ĉu al la Eternulo faros plezuron miloj da ŝafoj aŭ sennombraj torentoj da oleo? ĉu mi donu mian unuenaskiton pro mia krimo, la frukton de mia ventro pro la peko de mia animo? Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.

Psa 25,1-5 *Viajn vojojn, ho Eternulo, montru al mi*

Al Vi, ho Eternulo, mi levas mian animon.
Ho mia Dio, Vin mi fidas;
Ne lasu min hontiĝi;
Ne lasu, ke miaj malamikoj moku pri mi.
Ĉar neniu el tiuj, kiuj esperas al Vi, hontiĝos;
Nur tiuj hontiĝos, kiuj forlasas Vin senpripense.
Viajn vojojn, ho Eternulo, montru al mi:
Instruu min sekvi Vian iradon.
Gvidu min en Via vero kaj lernigu min,
Ĉar Vi estas la Dio, kiu min helpas;
Al Vi mi esperas ĉiun tagon.

1 Joh 4,19-21 *Ni amas, ĉar Li unue nin amis*

Ni amas, ĉar Li unue nin amis. Se iu diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton – tiu estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis. Kaj la jenan ordonon ni havas de Li: ke kiu amas Dion, tiu amu ankaŭ sian fraton.

Mat 16,24-26 *Kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin trovos*

Tiam Jesuo diris al siaj disĉiploj: Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min; ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin trovos. Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon? Aŭ kion homo donu interŝanĝe por sia animo?

Komento

Pere de la morto kaj reviviĝo de Jesuo Kristo ni liberiĝis de tio, ke ni donu mem sencon al nia vivo kaj meritu nian forton de propra fonto. Prefere ni vivas el la forto de la viviganta Kristo, kiu por ni homoj vivis, mortis kaj reviviĝis. Se ni „perdas“ nian vivon por Li, ni gajnas ĝin.

La profetoj ĉiam dronis en la demando al tiu direkto, en kio la homa vivo konvenas antaŭ la Sinjoro. La respondo de Miĥa estas unusenca kaj klara: „Nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.“ (Miĥ 6,8) La aŭtoro de la 25a psalmo sciis, ni ne povas tiun vojon sole laŭiri kaj petegis la Sinjoron por protektado, ke ni ne restu en honto.

Socia gardizolado kaj kreskanta soleco fariĝis en lastaj jaroj en Germanio kaj multaj aliaj landoj centra temo. Kiel kristanoj ni estas admonitaj por evoluigi la novajn formojn de kunvivado, en kio ni dividas la bazan kondiĉon de materia vivo kaj generacioj defendas unu la alian. La mesaĝo de la evangelio, ni travivu ne por ni mem, sed por Kristo kaj samtempe por proksimiĝi al la aliaj kaj venki la murojn de la soleco.

Demandoj

- Kiel ni povas en nia kulturo provi: oni vivu ne nur por si mem, sed por aliaj?
- Kiel ni povas praktike vivi por aliaj en niaj ĉiutagoj?
- Kion signifas la alvoko: ne plu por ni mem vivi, sed por ekumeno?

Preĝo

Dio, nia Sinjoro; Vi liberigis nin en Kristo,
de tiu vivo pri kiu ni hontis.

Konduku nin per la Sankta Spirito
kaj helpu nin vivi kiel gefratoj en Kristo.

Kiu vivis kaj suferis por ni.

Kiu mortis kaj reviviĝis por ni.

Kiu vivas kaj regas, eterne. Amen.

Tago 3-a: „... ne plu sole laŭ homaj mezursistemoj“ (2Kor 5,16)

Legajoj

1 Sam 16, 1.6 *Homo vidas tion, kio estas antaŭ la okuloj, sed la Eternulo rigardas en la koron.*

Kaj la Eternulo diris al Samuel: Kiel longe vi funebros pri Saul, kiun Mi trovis nedigna reĝi super Izrael? plenigu vian kornon per oleo, kaj iru; Mi sendos vin al Jiŝaj la Bet-Leĥemano, ĉar inter liaj filoj Mi elvidis al Mi reĝon.

Kiam ili venis, li ekvidis Eliabon, kaj diris: Jen antaŭ la Eternulo estas Lia sanktoleito.

Psa 19, 7-13 *La ordondiĝo de la Eternulo estas klara, faras lumon antaŭ la okuloj.*

Sur unu rando de la ĉielo estas ĝia leviĝo,

Kaj ĝia rondiĝo estas ĝis aliaj randoj;

Kaj nenio kaŝiĝas antaŭ ĝia varmego.

La instruo de la Eternulo estas perfekta, ĝojigas la animon;

La atesto de la Eternulo estas certa, ĝi saĝigas sensaĝulon.

La ordonoj de la Eternulo estas justaj, ĝojigas la koron;

La ordondiĝo de la Eternulo estas klara, faras lumon antaŭ la okuloj.

La timo antaŭ la Eternulo estas pura, restas eterne;

La juĝoj de la Eternulo estas veraj, kaj ĉiuj estas justaj.

Ili estas pli dezirindaj, ol oro kaj ol multe da plej pura oro;

Ili estas pli dolĉaj, ol mielo kaj ĉelaraj mielgutoj.

Ankaŭ Via sklavo instruiĝis per ili;

Kiu ilin observas, tiu havas grandan rekompencan.

Kiu scias siajn erarojn?

Purigu min de eraroj kaŝitaj.

Ago 9, 1-19 *Saŭlo iĝas Paŭlo*

Kaj Saŭlo, ankoraŭ spirante minacojn kaj mortigon kontraŭ la disĉiploj de la Sinjoro, iris al la ĉefpastro, kaj petis de li leterojn al la sinagogoj en Damasko, por ke, se li eble trovos homojn, aliĝintajn al la Vojo, ĉu virojn aŭ virinojn, li alkonduku ilin katenitajn al Jerusalemon. Kaj dum li vojaĝis, li alproksimiĝis al Damasko; kaj subite ekbrilegis ĉirkaŭ li lumo el la ĉielo; kaj li falis sur la teron, kaj aŭdis voĉon dirantan al li: Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas? Kaj li diris: Kiu vi estas, ho Sinjoro? Kaj tiu diris: Mi estas Jesuo, kiun vi persekutas; sed leviĝu, kaj eniru en la urbon, kaj estos dirite al vi, kion vi devas fari. Kaj liaj kunvojaĝantoj staris mutaj, aŭdante la voĉon, sed vidante neniun. Kaj Saŭlo leviĝis de la tero; kaj kiam liaj okuloj malfermiĝis, li vidis nenion; kaj ili kondukis lin je la mano, kaj venigis lin en Damaskon. Kaj li estis sen vidpovo tri tagojn; kaj ne manĝis, nek trinkis. Kaj en Damasko estis unu disĉiplo nomata Ananias; kaj la Sinjoro diris al li en vizio: Ananias. Kaj li respondis: Jen mi, Sinjoro. Kaj la Sinjoro diris al li: Leviĝu, kaj iru sur la straton, kiun oni nomas Rekta, kaj serĉu en la domo de Judas viron, nomatan Saŭlo, el Tarso; ĉar jen li preĝas; kaj li vidis viron, nomatan Ananias, enirantan kaj metantan sur lin la manojn, por ke li ricevu vidpovon. Sed Ananias respondis: Sinjoro, mi aŭdis de multaj pri ĉi tiu viro, kiom da malbono li faris kontraŭ viaj sanktuloj en Jerusalemon; kaj ĉi tie li havas de la ĉefpastroj aŭtoritaton kateni ĉiujn, kiuj vokas vian nomon. Sed la Sinjoro diris al li: Ekiru, ĉar li estas elektita ilo por mi, por porti mian nomon antaŭ la nacioj kaj la reĝoj kaj la Izraelidoj; ĉar mi montros al li, kiom li devas suferi pro mia nomo. Kaj Ananias ekiris, kaj eniris en la domon, kaj metinte sur lin la manojn, diris: Frato Saŭlo, min sendis la Sinjoro Jesuo, kiu aperis al vi en la vojo, laŭ kiu vi venis, por ke vi ricevu vidpovon kaj pleniĝu de la Sankta Spirito. Kaj tuj falis de liaj okuloj kvazaŭ skvamoj; kaj li tuj ricevis vidpovon, kaj leviĝis kaj baptiĝis; kaj preninte nutraĵon, li refortiĝis. Kaj dum kelke da tagoj li restis kun la disĉiploj en Damasko.

Mat 5, 1-12 *La beatecoj*

Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris sur la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disĉiploj venis al li; kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos.

Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.

Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutis la profetojn, kiuj estis antaŭ vi.

Komento

Renkonti Kriston estigas kompletan renverson, kiun spertis Paŭlo sur la vojo al Damasko. Unuafoje li vidis Jesuon kiel tiun, kiu li fakte estas: la Savanto de la mondo. Lia mondkoncepto estis radikale modifita kaj li devis forlasi sian homan kaj mondan pensmanieron.

Renkonti Kriston ŝanĝas ankaŭ nian perspektivon. Tamen ni restas ofte akroĉiĝintaj al la pasinteco kaj juĝas laŭ homaj kriterioj. Ni pretendas diri aŭ fari aĵojn „en la nomo de la Sinjoro“, kiuj fakte servas niajn proprajn interesojn.

Tra la historio, en Germanio kaj multaj aliaj landoj, ne nur la regantoj sed ankaŭ la eklezioj misuzis sian potencon kaj influon, strebante al maljustaj politikaj celoj.

En la jaro 1741, la membroj de la morava Eklezio (Herrnhuter), aliiĝintaj de sia renkonto kun Kristo, respondis al la alvoko neniun juĝi laŭ homa vidpunkto sed „submetiĝi al la regulo de Kristo“.

Submetante nin hodiaŭ al la regado de Kristo, ni estas vokataj vidi la aliajn tiel, kiel Dio ilin vidas, sen malfido kaj antaŭjuĝo.

Demandoj

- En mia vivo, ĉu estis momentoj, kiam mi sentis min „sur la vojo al Damasko“?

- Kio ŝanĝiĝas, kiam ni vidas kristanojn de aliaj konfesioj kaj homojn de aliaj religioj tiel, kiel ilin vidas Dio?

Preĝo

Triunua Dio, vi, kiu estas la fonto kaj la kulmino de ĉio vivanta,

Pardonu al ni, kiam ni pensas nur pri ni mem

kaj estas blindigitaj per niaj propraj kriterioj.

Malfermu nian koron kaj niajn okulojn.

Instruu nin ami, akcepti kaj kompati,

tiel ke ni povu kreski en la unueco, kiun vi donas al ni.

Al vi estu honoro kaj gloro por ĉiam kaj eterne. Amen.

Tago 4-a: *La malnovaĵoj forpasis (2Kor 5, 17)*

Legajtoj

Gen 19,15-26 *Ne turniĝu malantaŭen*

Kiam leviĝis la matenruĝo, la anĝeloj rapidigis Loton, dirante: Leviĝu, prenu vian edzinon kaj ambaŭ viajn filinojn, kiuj ĉi tie troviĝas, por ke vi ne pereu pro la krimeco de la urbo. Sed ĉar li malrapidis, tial la viroj kaptis lian manon kaj la manon de lia edzino kaj la manojn de liaj du filinoj, pro kompato de la Eternulo al li, kaj ili elirigis lin kaj metis lin ekster la urbon. Kaj kiam ili elkondukis lin eksteren, ili diris al li: Savu vin pro via animo; ne rigardu malantaŭen kaj haltu nenie en la tuta ĉirkaŭaĵo; sur la monton savu vin, por ke vi ne pereu. Kaj Lot diris al ili: Ho, ne, mia Sinjoro! Jen Via sklavo plaĉis al Vi, kaj granda estas la favorkoreco, kiun Vi montris al mi, konservante la vivon al mia animo; sed mi ne povas savi min sur la monton, ĉar povus trafi min malfeliĉo kaj mi mortus. Jen ĉi tiu urbo estas sufiĉe proksima, por kuri tien, kaj ĝi estas malgranda; mi savos min tien; ĝi estas ja malgranda; kaj mia animo restos viva. Kaj Li diris al li: Jen Mi komplezos al vi ankaŭ en ĉi tiu afero, kaj Mi ne renversos la urbon, pri kiu vi parolis. Rapide savu vin tien, ĉar Mi nenion povas fari, ĝis vi venos tien. Tial tiu urbo ricevis la nomon Coar. La suno leviĝis super la teron, kiam Lot venis Coaron. Kaj la Eternulo pluvigis sur Sodomon kaj Gomoran sulfuron kaj fajron de la Eternulo el la ĉielo. Kaj Li ruinigis tiujn urbojn kaj la tutan ĉirkaŭaĵon kaj ĉiujn loĝantojn de la urboj kaj la kreskaĵojn de la tero. Kaj lia edzino ekrigardis malantaŭen, kaj ŝi fariĝis kolono el salo.

Psa 77, 6-16 *Dio estas ĉiam fidela*

Mi meditas pri la tagoj antikvaj,
Pri la jaroj antaŭlonge pasintaj.
Mi rememoras en la nokto mian kanton;
Mi parolas kun mia koro,
Kaj mia spirito esploras.
Ĉu por eterne mia Sinjoro forpuŝis?
Kaj ĉu Li ne plu favoros?
Ĉu por eterne ĉesiĝis Lia boneco?
Ĉu Lia promeso ne plenumiĝos por ĉiuj generacioj?
Ĉu Dio forgesis indulgi?
Ĉu Li fermis en kolero Sian favorkorecon?
Kaj mi diris: Tio estas mia aflikto,
Ke aliiĝis la dekstra mano de la Plejaltulo.
Mi rememoros la farojn de la Eternulo;
Jes, mi rememoros Viajn antikvajn miraklojn.
Mi meditos pri ĉiuj Viaj faroj,
Kaj pri Viaj agoj mi parolos.
Ho Dio, en sankteco estas Via vojo;
Kiu estas tiel granda dio, kiel nia Dio?
Vi estas tiu Dio, kiu faras miraklojn;
Vi montris Vian forton inter la popoloj.
Vi liberigis per Via brako Vian popolon,
La filojn de Jakob kaj Jozef.

Fil 3, 7-14 *Mi forgesas tion kio estas malantaŭe*

Sed kio estis al mi gajno, tion mi rigardis kiel malgajnon pro Kristo. Kaj efektive mi rigardas ĉion kiel malgajnon pro la supereco de la scio de Kristo Jesuo, mia Sinjoro, pro kiu mi suferis malgajnon de ĉio, kaj rigardas ĉion kiel rubon, por ke mi gajnu Kriston, kaj estu trovata en li, ne

havante mian justecon, kiu devenas de la leĝo, sed la justecon, kiu estas per la fido al Kristo, la justecon, kiu devenas de Dio sur fidon; por ke mi sciu lin kaj la potencon de lia releviĝo kaj la kunulecon en liaj suferoj, konformiĝinte al lia morto, se mi povos iel atingi la releviĝon el la mortintoj. Ne kvazaŭ mi jam trafis, aŭ jam perfektigis; sed mi min pelas antaŭen, se mi nur povos ekteni tion, pro kio mi estas tenata de Kristo Jesuo. Miaj fratoj, mi ne rigardas min kiel jam ektenantan; sed nur jene: forgesante tion, kio estas malantaŭe, kaj strebante al tio, kio estas antaŭe, mi min pelas al la celo, por akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo Jesuo.

Luk 9, 57-62 *Meti sian manon al la plugilo*

Kaj dum ili vojaĝis, sur la vojo iu diris al li: Mi vin sekvos, kien ajn vi iros. Kaj Jesuo diris al li: La vulpoj havas kavojn, kaj la birdoj de la ĉielo havas ripozejojn; sed la Filo de homo ne havas, kie kuŝigi sian kapon. Kaj li diris al alia: Sekvu min. Sed li diris: Sinjoro, permesu al mi unue iri kaj enterigi mian patron. Sed li diris al li: Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn; sed vi iru kaj proklamu la regnon de Dio. Kaj ankoraŭ alia diris: Mi vin sekvos, Sinjoro; sed unue permesu al mi adiaŭi tiujn, kiuj estas en mia domo. Sed Jesuo diris al li: Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio.

Komento

Ni vivas ofte turniĝante al la pasinteco. Rerigardi malantaŭen certe povas esti utila kaj ofte necesa por resanigi la rememorojn. Sed ĝi povas ankaŭ paralizi nin kaj malhelpi nin en nuna vivo. Paŭlo proponas al ni ĉi tie liberigan mesaĝon: „La malnovaĵoj forpasis“.

La Biblio instigas nin teni la pasintecon en memoro, ĉerpi forton en nia memoro kaj memorfiksi, ke Dio faris bonon. Tamen, ĝi ankaŭ vokas nin forlasi malnovaĵojn, eĉ se ili estis bonaj, sekvi Kriston kaj malkovri novan vivon en Li.

Ĉijare multnombraj kristanoj memorfestas la laboron de Marteno Lutero kaj aliaj reformantoj. La reformacio funde ŝanĝis la vivon de la Okcidenta Eklezio. Multaj kristanoj montris sian fidon heroe, multaj aliaj estis renovigitaj en ilia kristana vivo. Kiel pruvas la Skriboj, tio estas tamen grava ne esti krampita per la okazaĵoj de la pasinteco sed anstataŭ tio malfermiĝi, per la graco de la Sankta Spirito, al nova estonteco, kie dividoj estas venkitaj kaj popolo de Dio reunuiĝos.

Demandoj

- Kion povus instrui al ni komuna legado de la historio de niaj dividoj kaj de nia reciproka malfido?
- Kion mia Eklezio devus ŝanĝi por ke ni venku niajn dividojn kaj la ligiloj de interkomunikado estu plifortigitaj?

Preĝo

Sinjoro Jesuo Kristo,
Vi ĉiam estas la sama hieraŭ, hodiaŭ kaj eterne,
sanigu nin de vundoj de la pasinteco,
benu nian komunan iradon al unueco hodiaŭ
kaj gvidu niajn paŝojn al la estonteco,
kiun Vi preparis por ni.
kiam Vi estos ĉio en ĉiuj,
kun la Patro kaj la Sankta Spirito,
nun kaj ĉiam kaj en ĉiuj jarcentoj. Amen.

Tago 5-a: *Se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo (2Kor 5, 17)*

Legaĵoj

Jeh 36, 25-27 Ricevi el Dio novan koron

Kaj Mi aspergos vin per pura akvo, kaj vi puriĝos de ĉiuj viaj malpuraĵoj, kaj de ĉiuj viaj idoloj Mi purigos vin. Kaj Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin; Mi eligos el via korpo la ŝtonan koron, kaj Mi donos al vi koron karnan. Kaj Mian spiriton Mi metos en vin, kaj Mi faros, ke vi agados laŭ Miaj leĝoj, kaj Miajn ordonojn vi observados kaj plenumados.

Psa 126,1-6 Esti ĝojoplenaj

Kiam la Eternulo revenigis la forkaptitojn al Cion,
Tiam ni estis kiel songantoj.
Tiam nia buŝo estis plena de gajeco,
Kaj nia lango plena de kantado;
Tiam oni diris inter la popoloj:
Ion grandan la Eternulo faris por ĉi tiuj.
Ion grandan la Eternulo faris por ni:
Ni ĝojas.

Revenigu, ho Eternulo, niajn forkaptitojn,
Kiel riveretojn en sudan landon.
Kiu semas kun larmoj,
Tiu rikoltos kun kanto.
Iras kaj ploras la portanto de semotaĵo;
Venas kun kanto la portanto de siaj garboj.

Kol 3, 9-17 Esti novaj homoj

Ne mensogu unu al alia, ĉar vi jam formetis la malnovan homon kun liaj agoj, kaj surmetis la novan homon, kiu estas renovigata al scio laŭ la bildo de Tiu, kiu lin kreis; kie ne povas esti Greko kaj Judo, cirkumcido kaj necirkumcido, barbaro, Skito, sklavo, liberulo, sed Kristo estas ĉio kaj en ĉio. Surmetu do, kiel elektitoj de Dio, sanktaj kaj amataj, koron de kompatato, bonkorecon, humilecon, mildecon, toleremecon; reciproke paciencante kaj pardonante, se iu havas plendon kontraŭ iu; kiel la Sinjoro pardonis vin, tiel vi ankaŭ faru; kaj super ĉion tion surmetu amon, kiu estas ligilo de perfekteco. Kaj la paco de Kristo prezidu en viaj koroj, al kiu ankaŭ vi estas vokitaj en unu korpo, kaj estu dankemaj. La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe, en ĉia saĝeco; kaj instruu kaj admonu unu la alian per psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj, kantante kun graco en viaj koroj al Dio. Kaj kion ajn vi faras per vorto aŭ ago, faru ĉion en la nomo de la Sinjoro Jesuo, dankante Dion, la Patron, per li.

Joh 3, 1-8 Naskiĝi el la Spirito

Estis viro el la Fariseoj, nomata Nikodemo, ĉefo inter la Judoj; tiu venis al li nokte, kaj diris al li: Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio; ĉar neniu povas fari tiujn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li. Jesuo respondis kaj diris al li: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio. Nikodemo diris al li: Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino kaj naskiĝi? Jesuo respondis: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito. Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj. La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito.

Komento

Paŭlo renkontis Kriston, la resurektintan Sinjoron, kaj fariĝis nova homo – kiel kiu ajn kredas je Kristo. Tiu nova kreaĵo ne estas videbla per homaj okuloj, sed per la reala fido. Dio vivas en ni per la potenco de la Spirito, kaj kundividigas al ni la vivon de la Triunuo.

Per tiu ago de nova kreo, la pekfalo estas superita kaj ni estas transportitaj en novan rilaton kun Dio. Sekve de tio, pri ni, oni diras admirindaj aferoj: kiel diras Paŭlo, en Kristo ni estas nova kreaĵo, per la resurektinto oni superas la morton, neniu kaj nenio povas eviti la manon de Dio; ni estas unu en Kristo kiu vivas en ni; en Kristo ni estas “[...] pastroj al Dia servo, kaj regas kun vi” (Apo 5, 10) estu la gloro al Li por la venko sur la morto kaj ni proklamu la promeson de nova kreado.

Tiu nova vivo fariĝas videbla, se ni donas al ĝi formon per sentoj “[...] de mizerikordo, de boneco, de humileco, de pacienco, kaj de mildeco”. Ĝi devas ankaŭ travidiĝi de niaj ekumenaj rilatoj. Komuna konvinko inter la eklezioj estas ke ju pli profunde ni estas en Kristo, des pli ni estas proksimaj unuj al la aliaj. En tiu datreveno de la luterana Reformo ni memorigas, precipe, pri alvenpunktoj kaj la tragedioj de nia historio. La amo de Jesuo instigas nin vivi kiel novaj homoj, kiuj aktive strebas al la unueco kaj al la repaciĝo.

Demandoj

- Kion helpas al mi konsideri min kiel nova kreaĵo en Kristo?
- Kiaj paŝoj mi devas fari por plene vivi mian novan vivon en Kristo?
- Kiaj estas la ekumenaj implicoj de esti nova kreaĵo?

Preĝo

Ho Triunua Dio, Vi montras vin al ni
kiel Patron kaj kreinton, kiel Filon kaj savanton,
kaj kiel Spiriton kaj vivdonanton, tamen Vi estas unu.
Vi rompas niajn homajn barilojn kaj renovigas nin.
Donu al ni novan koron por superi ĉion,
kio endanĝerigas nian unuecon en Vi.
Ni preĝas al Vi per la nomo de Jesuo Kristo
en la potenco de la Sankta Spirito. Amen.

Tago 6-a: *Dio repacigis kun si la mondon (2 Kor 5, 18)*

Legaĵoj

Gen 17, 1-8 *Dio starigas interligon kun Abrahamo*

Kiam Abram havis la aĝon de naŭdek naŭ jaroj, aperis la Eternulo al Abram, kaj diris al li: Mi estas Dio la Plejpotenca; iradu antaŭ Mi kaj estu senpeka. Kaj Mi faros Mian interligon inter Mi kaj vi, kaj Mi multigos vin tre forte. Kaj Abram ĵetis sin vizaĝaltere, kaj Dio parolis al li, dirante: Jen estas Mia interligo kun vi: vi estos patro de multe da popoloj. Kaj via nomo ne estos plu Abram, sed via nomo estos Abraham, ĉar Mi faris vin patro de multe da popoloj. Kaj Mi fruktigos vin tre multe, kaj Mi devenigos de vi popolojn, kaj reĝoj devenos de vi. Kaj Mi starigos Mian interligon inter Mi kaj vi kaj via idaro post vi en iliaj generacioj, eternan interligon, ke Mi estos Dio por vi kaj por via idaro post vi. Kaj Mi donos al vi kaj al via idaro post vi la landon, en kiu vi loĝas kiel fremdulo, la tutan landon Kanaan, por eterna posedaĵo, kaj Mi estos Dio por ili.

Psa 98, 1-9 *La tuta tero povis vidi la venkon de Dio*

Kantu al la Eternulo novan kanton,
Ĉar miraklojn Li faris;
Helpis Lin Lia dekstra mano kaj Lia sankta brako.
La Eternulo aperigis Sian savon;
Antaŭ la okuloj de la popoloj Li malkaŝis Sian justecon.
Li memoras Sian bonecon kaj Sian fidelecon al la domo de Izrael.
Vidis ĉiuj finoj de la tero la helpon de nia Dio.
Ĝoje krii al la Eternulo la tuta tero;
Kantu, glori, kaj muziku.
Muziku al la Eternulo per harpo,
Per harpo kaj per sonoj de psalmo.
Per trumpetoj kaj per sono de korno
Ĝoje krii antaŭ la Reĝo, la Eternulo.
Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,
La mondo kaj ĝiaj loĝantoj.
La riveroj plaŭdu per la manoj,
La montoj kune kantu ĝoje,
Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas,
Por juĝi la teron;
Li juĝos la mondon kun justeco
Kaj la popolojn kun vereco.

Rom 5, 6-11 *Dio repacigis nin kun si pere de Jesuo Kristo*

Ĉar kiam ni ankoraŭ estis senfortaj, tiam Kristo ĝustatempe mortis pro malpiuloj. Ĉar apenaŭ pro justulo iu mortus; ĉar pro bonulo eble iu kuraĝus morti. Sed Dio rekomendas al ni Sian amon en tio, ke dum ni ankoraŭ estis pekuloj, Kristo mortis por ni. Des plimulte do ni, jam pravigite per lia sango, estos per li savitaj el la kolero. Ĉar se ni, estante malamikoj, estas repacigitaj kun Dio per la morto de Lia Filo, des plimulte, repacigite, ni estos savitaj per lia vivo; kaj krom tio ni fieras ankaŭ en Dio pro nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu ni jam ricevis la repacigon.

Luk 2, 8-14 *Mi venigas al vi bonan sciigon*

Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kampoĝis kaj nokte gardis sian gregon. Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo. Kaj la anĝelo diris al ili: Ne timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu

estos al la tuta popolo; ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo. Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante: Gloro al Dio en la supera alto, Kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro.

Komento

La repaciĝo havas du aspektojn: ĝi allogas kaj terurigas samtempe: Ĝi altiras nin al si tiamniere, ke ni deziras ĝin; en nia interno, en la reciprokaj rilatoj kaj inter niaj malsimilaj konfesiaj tradicioj. Ni vidas ĝian prezon kaj tio timigas nin, ĉar repaciĝi signifas rezigni nian deziron je povo kaj je rekono. En Kristo, Dio senpage repacigis nin al si kvankam ni malproksimiĝis de li. La agado de Dio preteriras: Dio repacigas al si ne nur la homaron, sed la tutan kreitaron.

En la Malnova Testamento Dio estis fidela kaj mizerikorda al la popolo Izraela, kun kiu li estis stariginta interligon. Ĉi tiu interligo restas: ja “la donacoj kaj la vokado de Dio estas nerevokeblaj.” (Rom 11, 29). Jesuo, kiu inaŭguris la novan interligon en sia sango, estis filo de Izraelo. Tro ofte en la historio, niaj eklezioj forgesis honoron ĉi tiun aspekton. Post la Holokaŭsto, kontraŭbatali antisemitismon estas specifa tasko de la germanaj eklezioj. En analoga maniero, ĉiuj eklezioj estas vokataj porti repaciĝon en siajn komunumojn kaj rezisti al ĉiuj formoj de homa diskriminacio, ĉar ni ĉiuj estas parto de la interligo de Dio.

Demandoj

- Kiamanere, kiel kristanaj komunumoj, ni komprenas la fakton ke ni estas parto de la interligo de Dio?
- Kiajn formojn de diskriminacio niaj eklezioj devas denunci, hodiaŭ, en nia socio?

Preĝo

Ho mizerikorda Dio, pro amo
Vi starigis interligon kun via popolo.
Donacu al ni la forton nin deteni
de ĉia formo de diskriminacio.
Faru ke la donaco de via ama interligo
plenigu nin per ĝojo kaj inspiru nin al pligranda unueco.
Per Jesuo Kristo, resurektinta por ni,
kiu vivas kaj regnas dum ĉiuj jarcentoj da jarcentoj.
Amen.

Tago 7-a: *La servo de repaciĝo (2 Kor 5,18-19)*

Legaĵoj

Gen 50,15-21 Jozefo repaciĝas kun la fratoj

Kiam la fratoj de Jozef vidis, ke ilia patro mortis, ili diris: Eble Jozef ekmalamos nin, kaj repagos al ni pro la tuta malbono, kiun ni faris al li? Tial ili sendis al Jozef, por diri al li: Via patro ordonis antaŭ sia morto jene: Tiel diru al Jozef: Mi petas vin, pardonu la kulpon de viaj fratoj kaj ilian pekon, ĉar ili faris al vi malbonon. Nun pardonu do la kulpon de la sklavo de la Dio de via patro. Kaj Jozef ploris, kiam ili parolis al li. Kaj iris liaj fratoj mem kaj ĵetis sin teren antaŭ li, kaj diris: Jen ni estas sklavo de vi. Sed Jozef diris al ili: Ne timu; ĉar ĉu mi estas anstataŭ Dio? Vi intencis fari al mi malbonon; sed Dio aranĝis de tio bonon, por fari tiel, kiel nun estas, por konservi la vivon de multe da homoj. Kaj nun ne timu; mi nutros vin kaj viajn infanojn. Kaj li konsolis ilin kaj parolis al ili kore.

Psa 72,1-19 Justeco kaj paco - signoj de la Dia regno

Ho Dio, Vian juĝon donu al la reĝo

Kaj Vian justecon al la reĝido.

Li juĝu Vian popolon kun vero

Kaj Viajn prematojn kun justeco.

La montoj alportu al la popolo pacon,

Ankaŭ la montetoj, per justeco.

Li juĝu la prematojn en la popolo,

Li savu la filojn de senhavulo,

Kaj li disprenu la premanton.

Oni timu Vin tiel longe, kiel ekzistos la suno kaj la luno,

De generacioj al generacioj.

Li malleviĝu, kiel pluvo sur falĉitan herbejon;

Kiel gutoj, kiuj malsekigas la teron.

En liaj tagoj floru virtulo kaj granda paco,

Ĝis ne plu ekzistos la luno.

Li regu de maro ĝis maro

Kaj de la Rivero ĝis la finoj de la tero.

Kliniĝu antaŭ li la dezertanoj,

Kaj liaj malamikoj leku polvon.

La reĝoj de Tarŝiŝ kaj de la insuloj alportu donacojn;

La reĝoj de Ŝeba kaj Seba venigu donojn.

Kliniĝu antaŭ li ĉiuj reĝoj;

Ĉiuj popoloj lin servu.

Ĉar li savos ploregantan malriĉulon

Kaj senhelpan mizerulon.

Li estos favorkora por malriĉulo kaj senhavulo,

Kaj li savos la animojn de mizeruloj.

De malico kaj krimo li savos iliajn animojn;

Kaj kara estos ilia sango en liaj okuloj.

Kaj li vivu, kaj oni donu al li el la oro de Ŝeba;

Kaj oni ĉiam preĝu por li, kaj ĉiutage oni lin benu.

Estu multe da greno en la lando;

Sur la supro de la montoj ĝiaj spikoj ondiĝu kiel Lebanon;

Kaj en la urboj ĉio floru, kiel herbo sur la tero.

Lia nomo estu eterna;

Tiel longe, kiel ekzistas la suno, kresku lia nomo;
Ĉiuj popoloj sin benu per li kaj gloru lin.
Glorata estu Dio la Eternulo, Dio de Izrael,
Kiu sola faras miraklojn.
Kaj laŭdata estu Lia glora nomo eterne;
Kaj Lia gloro plenigu la tutan teron.
Amen, kaj amen!

1 Joh 3,16b-21 *Pelas nin la amo de Dio ke amu unu la alian*

Kaj ni devus demeti nian vivon pro la fratoj. Sed se iu havas mondan posedaĵon kaj vidas sian fraton havantan bezonon kaj fermas sian kompaton kontraŭ li, kiel la amo de Dio restas en li? Infanetoj, ni amu, ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero. Per tio ni scios, ke ni estas el la vero, kaj ni certigos nian koron antaŭ Li en ĉio ajn, pri kio nia koro nin kondamnas; ĉar Dio estas pli granda ol nia koro, kaj scias ĉion. Amataj, se nia koro ne kondamnas nin, ni havas kuraĝon antaŭ Dio.

Joh 17,20-26 *Jesuo preĝas por la unueco de la Eklezio*

Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektigu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis. Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas, ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili vidu mian gloron, kiun Vi donis al mi; ĉar Vi amis min antaŭ la fondo de la mondo. Ho, Patro justa, la mondo Vin ne konis, tamen mi Vin konis; kaj ĉi tiuj scias, ke Vi min sendis; kaj al ili Vian nomon mi konigis kaj ankoraŭ konigos, por ke la amo, per kiu Vi amis min, estu en ili, kaj mi en ili.

Komento

Repaciĝo inter Dio kaj homoj estas la centra realo de nia kristana kredo. Paŭlo estis konvinkita pri la sintrudiĝo de la amo de Kristo al ni por realigi la repaciĝon Dian en ĉiuj kampoj de la vivo. Tial ni esploru nian konsciencon rigardante la malkunaĵojn inter ni.

La rakonto de Jozefo montras ke Dio per sia graco estas ĉe nia flanko, kondiĉe ke ni klopodu por la sanigo de rompitaĵ rilatoj.

Gravaj reformantoj - Marteno Lutero, Ulriko Zvinglo, Johano Kalvino - kaj multaj aliaj daŭre katolikaj (Ignaco Lojola, Francisko el Sales, Karlo Boromeo) celis reformiĝon de la Okcidenta eklezio. Sed la plano kiu atestu la Dian gracon misfiguriĝis pro la pekemo homa kaj kondukis al rompiĝo de la unueco kristana. Peko kaj milito ebligas kreskon de malamikeco kaj reciproka malkonfido dum jarcentoj.

Tial signifas servon je repaciĝo la klopodo pri forigo de skismoj ene de la kristanaro. Nuntempe multaj kristanaj eklezioj kunlaboras en reciprokaj konfido kaj respekto. Bona ekzemplo de intereklezia repaciĝo estas ada dialogo inter la Tutmonda luterana asocio kaj la Tutmonda menonita konferenco.

Okaze de la publikigo de la esplordokumento „Sanigi la memoron - repaciĝi en Kristo“ ambaŭ organizaĵoj celebris en la jaro 2010-a pentan diservon. Pli poste okazis en multaj lokoj en Germanio kaj alie pluaj repaciĝaj diservoj.

Demandoj

- Kie en nia kunteksto necesas la servo je repaciĝo?
- Kiamaniere ni reagis je tiu neceso?

Preĝo

Dio bona,

ni dankas vin, ĉar vi repacigas nin kaj la tutan mondon en Kristo kun vi.

Fortigu nin, niajn komunumojn kaj niajn ekleziojn en la servo je repaciĝo.

Sanigu nian koron kaj helpu akceli la pacon.

Ni amu, kie oni malamas;

ni pardonu, kie oni ofendas;

ni alportu kredon, kie malcerto minacas;

ni veku esperon, kie malespero turmentas;

ni eklumigu lumon, kie malhelo regas;

ni disdonu ĝojon, kie ĉagreno estas.

Por tio ni petas vin en la nomo de Jesuo Kristo per la forto de la Sankta Spirito.

Amen.

Tago 8-a: Repaciĝintaj al Dio (2 Kor 5, 20)

Legajoj

Miĥ 4, 1-5 *En lastaj tagoj la justeco reĝos*

Sed iam en la tempo estonta la monto de la domo de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj, kaj ĝi estos pli alta ol ĉiuj altaĵoj; kaj fluos al ĝi popoloj. Kaj iros multaj nacioj, kaj diros: Venu, ni iru supren sur la monton de la Eternulo kaj en la domon de Dio de Jakob, por ke Li instruu nin pri Siaj vojoj kaj ke ni iru laŭ Lia irejo; ĉar el Cion eliros la instruo, kaj la vorto de la Eternulo el Jerusalem. Kaj Li juĝos inter multe da popoloj, kaj Li decidos pri potencaj nacioj [en landoj malproksimaj]; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon. Sed ĉiu sidos sub sia vinberujo kaj sub sia figarbo, kaj neniu timigos; ĉar la buŝo de la Eternulo Cebaot tion diris. Ĉiuj popoloj iros ĉiu en la nomo de sia dio, sed ni irados en la nomo de la Eternulo, nia Dio, ĉiam kaj eterne.

Psa 87,1-7 *Glorajojn oni rakontas pri vi, urbo de Dio*

Lia fundamento estas sur la sanktaj montoj.

La Eternulo amas la pordegojn de Cion

Pli ol ĉiujn loĝejojn de Jakob.

Glorajojn Li rakontas pri vi,

Ho urbo de Dio.

Mi parolas al miaj konatoj pri Egiptujo kaj Babel,

Ankaŭ pri Filiŝtujo kaj Tiro kun Etiopujo:

Jen tiu tie naskiĝis.

Sed pri Cion oni diras:

Tiu kaj tiu tie naskiĝis,

Kaj Li, la Plejaltulo, ĝin fortikigas.

La Eternulo notos, enskribante la popolojn:

Ĉi tiu tie naskiĝis.

Kaj la kantistoj kaj muzikistoj:

Ĉiuj miaj fontoj estas en Vi.

Apo 21, 1-5a *Dio faros novan ĉielon kaj novan teron*

Kaj mi vidis novan ĉielon kaj novan teron; ĉar la unua ĉielo kaj la unua tero forpasis; kaj la maro jam ne ekzistis. Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio, pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo. Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la trono, dirantan: Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili, kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio; kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis. Kaj diris la Sidanto sur la trono: Vidu, Mi faras ĉion nova.

Joh 20, 11-18 *La renkontiĝo kun la Sinjoro resurektinta estigas la personan mision*

Sed Maria staris ekstere apud la tombo, plorante; kaj dum ŝi ploris, ŝi kliniĝis, kaj enrigardis en la tombon; kaj ŝi vidis du anĝelojn en blankaj vestoj, sidantajn, unu ĉe la kaploko kaj unu ĉe la piedloko, kie la korpo de Jesuo antaŭe kuŝis. Kaj ili diris al ŝi: Virino, kial vi ploras? Ŝi respondis: Ĉar oni forprenis mian Sinjoron, kaj mi ne scias, kien oni lin metis. Dirinte tion, ŝi sin turnis malantaŭen, kaj vidis Jesuon staranta, kaj ne sciis, ke ĝi estas Jesuo. Jesuo diris al ŝi: Virino, kial vi ploras? kiun vi serĉas? Ŝi, supozante, ke li estas la ĝardenisto, diris al li: Sinjoro, se vi forportis lin, sciigu min, kien vi metis lin, kaj mi lin forprenos. Jesuo diris al ŝi: Maria. Ŝi sin turnis, kaj diris al li hebrelingve: Raboni; tio estas Majstro. Jesuo diris al ŝi: Ne tuŝu min; ĉar mi

ankoraŭ ne supreniris al la Patro; sed iru al miaj fratoj, kaj diru al ili: Mi supreniras al mia Patro kaj via Patro, kaj al mia Dio kaj via Dio. Maria Magdalena venis al la disĉiploj, sciigante: Mi vidis la Sinjoron; kaj ke li tion diris al ŝi.

Komento

Kio okazus, se...? Kio okazus, se la Bibliaj profetaĵoj fariĝus realaj? Kio okazus, se la militoj inter nacioj ĉesus kaj la bataliloj fariĝus viviloj? Kio okazus, se la justeco de Dio kaj la paco regus, paco kiu estus pli granda ol la nura neesto de militoj? Kio okazus, se la tuta homaro kuniĝus en cerebro, kie neniu estus eksterlasita? Kio okazus, se ne plu ekzistus funebro, nek ploro, nek morto? Tio estus la pleneco de repaciĝo realigita de Dio en Jesuo Kristo. Tio estus la ĉielo!

La psalmoj, la kantikoj kaj la himnoj prikantas la tagon, kiam la tuta kreaĵaro, kondukite al pleneco, fine atingis sian celon, la tagon, kiam Dio estos „ĉio en ĉiuj“. Ili parolas pri la kristana espero, pri la plenumiĝo de la Dia regno, en kiu la sufero konvertiĝos en ĝojon. Tiam, la Eklezio riveliĝos en sia beleco kaj graco kiel la ununura korpo de Kristo. En ĉiuj okazoj, kiam ni kunvenas en la Sankta Spirito por kune kanti la plenumiĝon de la Diaj promesoj, tiam la ĉieloj malfermiĝas kaj ni komencas danci nun kaj ĉi tie je la sono de melodio de la eterneco.

Ĉar ni jam povas sperti tiun ĉi ĉeeston de la ĉielo, do ni kune celebru. Ni povas senti nin inspiritaj por montri bildojn, poeziaĵojn kaj kantikojn de nia aprara tradicio. Tiuj ĉi rimedoj povas malfermi spacojn por ke ni spertu nian komunan kredon kaj nian esperon je la Regno de Dio.

Demandoj

- Kion vi imagas pri la ĉielo?
- Kiuj kantikoj, historioj, poeziaĵoj kaj bildoj de via tradicio donas al vi la senton partopreni en la realo nome eterneco de Dio?

Preĝo

Triunua Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito,
ni dankas al Vi pro tiu ĉi Semajno de Preĝado,
pro nia kunvivado kiel kristanoj kaj pro la diversaj manieroj,
per kiuj ni sentis Vian ĉeeston.
Faru, ke ni ĉiam sukcesu laŭdi kune Vian sanktan nomon,
por ke ni daŭre kresku en unueco kaj repaciĝo.
Amen.

LA EKUMENA SITUACIO EN GERMANIO

Kunlabori en Ŝanĝiganta Socio

El la 81 milionoj da enloĝantoj en Germanio hodiaŭ, 50 milionoj estas kristanoj. La plimulto de ili membriĝas aŭ en la Romkatolika Eklezio aŭ en unu el la protestantaj regionaj eklezioj kiuj kune konsistigas la Evangeliisman Eklezion en Germanio (EKD). Kvankam kompare malgrandaj, ankaŭ estas "Liberaj Eklezioj", la Ortodoksa Eklezio kaj, efektive, ĉiuj ĉefaj kristanaj tradicioj ĉeestas en Germanio hodiaŭ.

Antaŭ jarcentoj, Germanio konsistis el multaj reĝlandoj kaj princlandoj sed ĝi estis unuigita de komuna eklezio. La Reformacio, gvidata interalie de Marteno Lutero, sekvigis skismojn ĉe la Okcidenta Kristanaro kaj, fine, militojn inter katolikaj kaj protestantaj fortoj. La Paco de Aŭgsburgo (1555) kelktempe ĉesigis ĉi tiujn konfliktojn per kondiĉo, ke la popolo de iu reĝlando aŭ princlando devas aliĝi al la konfeso de sia reganto. Tiuj, kiuj kredis alie, estis devigitaj konvertiĝi aŭ transloĝiĝi al alia regiono. Ĉi tiuj kondiĉoj koncernis luteranojn kaj katolikojn, sed ne la sekvantaron de Kalvino kaj la anabaptistojn, kiuj sekve estis la objektoj de persekutado. La Paco de Aŭgsburgo daŭris dum pli ol ses jardekoj ĝis la eksplodo de la Tridekjara Milito (1618-1648). Pacon restarigis la Vestfalia Paco kiu konfirmis la Pacon de Aŭgsburgo, ĉi-foje, tamen, kun rimedoj por kalvinistoj. Rezulte, la germana popolo vivis en regiona konfesia izoleco. Konfesia diverseco ene de suverena lando estis neimagebla, kaj, instigataj de la hororoj de la milito, malfido kaj malamikeco inter la konfesioj estis senbridaj.

En la 19a jarcento alvenis aliaj eklezioj kaj konfesioj en Germanio, inter ili la baptista kaj metodista, kaj ankaŭ malnovkonfesiaj eklezioj (la eklezioj Malnova Luterana, Malnova Reformita kaj Malnova Katolika). Ofte, ilian leviĝon igis protestaj movadoj interne de eklezioj. Rezulte, la malnovkonfesiaj eklezianoj estis relative malmultaj kaj plejparte ne deziris ekumenajn rilatojn.

Post la Dua Mondmilito, la situacio de la kristanaj eklezioj en Germanio multe ŝanĝiĝis. Ĉirkaŭ 12 milionoj da homoj de germana deveno fuĝis aŭ estis elpelitaj el Orienta Eŭropo. Kiam oni ilin reloĝigis en Germanio, oni ne konsideris la demandon pri tio, al kiu kristana tradicio ili aliĝis. Protestantoj venis ekloĝi en katolikaj lokoj kaj inverse. Rezulte, protestantoj kaj katolikoj ekhavis pli proksiman kontakton inter si.

La ekonomia kaj industria kresko postmilitaj kreis bezonon de laborfortoj, kio sekvigis interkonsentojn inter la germana registaro kaj multaj mediteraneaj landoj pri "gastlaboristoj". Ĉi tiel, laboristoj el Italio, Hispanio, Portugalio, Grekio, Jugoslavio, Turkio, Maroko kaj Tunizio venis al Germanio, pliiĝante la konfesian kaj religian diversecon de la lando. Precipa rezulto estis kresko de la ortodoksula ĉeesto en Germanio. Komence, oni kredis ke ili revenos al siaj hejmlandoj post du jaroj (tial la nomo "gastlaboristoj"), sed multaj restis kaj lasis sian markon sur la germanaj vivo kaj kulturo. En la 1980aj jaroj, kreskis la nombro de enmigrintoj kun germanaj radikoj el la siatempa Sovetunio, inter kiuj multaj estis ortodoksuloj, baptistoj aŭ judoj. En lastaj jaroj, militoj, terorismo kaj socia agitado en Mezoriento, Afriko, Afganio, Ukrainio kaj multaj aliaj landoj kaŭzis grandan fluon de rifuĝintoj. Kvankam la plimulto fuĝas al najbaraj regionoj, pli kaj pli da migrintoj serĉas rifuĝon en Germanio kaj aliaj eŭropaj landoj.

En la iama Germana Demokrata Respubliko, la eklezioj - precipe la protestantaj - ludis kernan rolon en la eventoj tuj antaŭ la falo de la Berlina muro (1989) kaj la defalo de la komunista

registaro. Eĉ tio, tamen, ne malhelpis ke la kristana fido perdu sian gravecon en orienta Germanio. La brita ĵurnalo The Guardian eĉ ne hezitis karakterizi orientan Germanion kiel "la plej senreligian lokon sur la tero". La regado de la komunista registaro neniel estis la sola kialo de la manko de religieco tie; la kristana fido jam estis malfortiĝanta en orienta Germanio eĉ antaŭ la komunistoj enoficiĝis. Malkiel la ateismo de la tiel nomitaj "novaj ateistoj", la ateismo de orienta Germanio tute ne estas de agresema naturo. Male, ĝi estas karakterizata de enradikiĝinta indiferenteco pri ĉia fido. Kiam oni demandis al berlinanoj, ĉu ili konsideras sin esti kredantoj aŭ nekredantoj, iu persono respondis: "mi estas nek unu, nek la alia, mi estas normala".

Hodiaŭ, Germanio estas la hejmo de homoj el multo de diversaj kulturaj fonoj, kaj de diversaj - aŭ neniuj - kredoj. Ĉirkaŭ unu triono de la loĝantaro apartenas al unu el la protestantaj regionaj eklezioj en la EKD, unu triono estas romkatolikoj kaj iomete malpli ol unu triono ne aliĝas al iu fido. 1,7% de la loĝantaro estas ortodoksaj kristanoj, aliaj 1,8% estas membroj de unu el la liberaj eklezioj. Tiuj plejparte estas eklezioj kiu havas fortan historiajn kaj teologiajn ligilojn al la Reformacio sed ne havas ligilojn al la ŝtato kiel havas la romkatolika eklezio kaj la EKD. 4,9% de la loĝantaro estas islamanoj, 0,1% estas judoj.

La eklezioj en Germanio ankoraŭ ne superis ĉiujn siajn diferencojn, sed ili lernis kunlabori. Dum la regado de la nacisocialistoj, iuj kristanoj kunlaboris kun la registaro. Aliaj, tamen, rezistis kaj estis malliberigitaj aŭ senditaj al koncentrejoj. Estis la komuna sperto de vivado kaj suferado sub la diktatorado de la nazioj kiu pliproksimigis kristanojn de diversaj tradicioj unu al la alia. Hodiaŭ, germanaj eklezioj multe pli efike kunlaboras por plenumi la mision de la eklezio kaj atesti pri la Evangelio vorte kaj fare. Pro tio, ke kaj la romkatolika eklezio kaj la EKD havas multajn membrojn, ili ankaŭ konsistigas grandan parton de la ekumena kunlaboro kiu okazas en Germanio.

Granda parto de la ekumenismo en Germanio okazas en la lokaj komunumoj, ekzemple la Preĝosemajno de la Evangelia Alianco kaj la Preĝosemajno por la Unueco de Kristanoj. Najbaraj paroĥoj kaj preĝejanaroj ofte organizas ekumenajn aktivadojn kiel biblia studado, diskutoj pri teologiaj temoj, festoj, komunaj retejoj, vizitoj al novuloj en la komunumo, kaj ankaŭ distribuas flugfoliojn ĉe lokaj fervojaj stacioj kun informoj pri la kristanaj preĝejoj. Ĉi tian laboron kutime faras volontuloj kiuj estas membroj de la lokaj preĝejoj. En iuj regionoj, preĝejanaroj kaj paroĥoj aliĝas al lokaj ekumenaj partnerecoj, subskribante formalan interkonsenton kiu formas la kadron de ilia kunlaboro. Ĉi tiuj interkonsentoj estas kutime bazitaj sur similaj skribaj interkonsentoj inter la gvidantoj de la koncernataj eklezioj.

Ekumena kunlaboro ankaŭ okazas ĉe la gvidantaroj de la eklezioj. Ekzemple, grupo de katolikaj kune kun protestantaj episkopoj de la EKD kunsidas dufoje ĉiun jaron por pridiskuti aktualajn temojn kiuj efikas sur la eklezioj. Alia grupo pridiskutas teologiajn aferojn - kiel la koncepto de la homa digno. Aldone al ĉi tiuj dupartiaj kunsidoj, ankaŭ estas regulaj kunsidoj inter reprezentantoj de la Ortodoksa Episkopa Konferenco kaj respektive la romkatolikaj kaj protestantaj episkopoj, kaj inter la Asocio de Liberaj Eklezioj kaj la EKD.

Grandskalaj ekleziaj kongresoj aŭ renkontiĝoj por la membroj de iu eklezio estas tipa karakterizaĵo de la kristana pejzaĝo en Germanio. Katolikoj ilin nomas 'Katholikentage', kaj Protestantoj 'Kirchentage'. Ambaŭ okazas ĉiun duan jaron, kaj ilin organizas respektive la Centra Komitato de Germanaj Katolikoj kaj la Germana Evangeliisma Kirchentag (DEKT). Principe, ili ĉefe estas renkontiĝoj por la membroj de unu eklezio, sed jam dum multaj jaroj ilin ĉeestas membroj de diversaj eklezioj kiuj eĉ estas invititaj kiel gastparolantoj.

En 2003 kaj en 2010, ĉiuj membro-eklezioj de la Germana Konsilio de Eklezioj kuniĝis por organizi similan kongreson sur ekumena nivelo nomita Ökumenischer Kirchentag. Oni diskutis multajn aferojn kiuj gravas por la germana socio (la tutmonda financa krizo, la klimatsanĝiĝo, etikaj demandoj pri la homa vivo, justeco, ktp.). De egala graveco estis la multaj bibliaj studoj, teologiaj diskutoj, kaj ekumenaj Diservoj. Okazigi ĉi tiujn kunvenojn, precipe la ekumenan Kirchentage, estas bonega ŝanco por kristanoj en Germanio montri ne nur ke ili ankoraŭ aktivas, sed ankaŭ ke ili vole kunlaboros kaj engaĝos la ceteran germanan socion en dialogo.

La Konsilantaro de eklezioj en Germanio

La Konsilantaro de eklezioj en Germanio (*Arbeitsgemeinschaft Christlicher Kirchen, ACK*) estis fondita la 10-an de marto 1948, do kelkajn monatojn antaŭ la fondiĝo de la Tutmonda konsilantaro de eklezioj. La fondintaj membroj estis EKD, menonitoj, baptistoj, metodistoj kaj la malnov-katolika eklezio. En la jaro 1974, dek jarojn ekde la aprobo de la dekreto pri ekumenismo eldonita de la Dua Vatikana Koncilio, la konferenco de germanaj katolikaj episkopoj aliĝis al la Konsilantaro de eklezioj. Post la reunuiĝo de Germanio la okcident-germana kaj orient-germana konsilantaroj de eklezioj kunfandiĝis. Ambaŭ konsilantaroj havis malsaman strukturon kaj membrecon, do estis necese estigi novan ekumenan organizon kun novaj statutoj. Hodiaŭ la Konsilantaro de eklezioj en Germanio havas 17 membro-ekleziojn. Krome, ses eklezioj estas gast-membroj kaj kvar ekumenaj organizoj havas observan statuson.

En la jaro 2003, dum la unua ekumena *Kirchentag* en Berlino, reprezentantoj de ĉiuj membro-eklezioj de ACK celebris ekumenan diservon kaj subskribis „*Charta Oecumenica*“ (*Ekumenan Ĉarton*), kiun estigis la Konferenco de eŭropaj eklezioj kaj la Konsilantaro de eŭropaj episkopaj konferencoj de la romkatolika eklezio. ACK ankaŭ publikigis sian propran tekston, kiu parolas pri la signifo de la „*Charta Oecumenica*“ en germana kunteksto kaj pri la apliko de la „*Charta*“ en Germanio.

En la jaro 2010, dum la dua ekumena *Kirchentag* en Munkeno, ACK estigis la “Ekumenan tagoj de kreaĵaro”, tiel ĝi realigis unu el la rekomendoj de la “*Charta Oecumenica*”. La ekumena tago de kreaĵaro devus esti la komuna atesto pri nia kredo en Dio kiel Kreinto kaj ĝi devus rememorigi nin pri nia komuna tasko de ŝirmado de la Dia kreaĵaro. Ĉi tiu tago de kreaĵaro estas festata ĉiujare en la unua vendredo de septembro. La unuan festadon de la ekumena tago de kreaĵaro preparis ACK en la ortodoksa preĝejo en Bruhl. Hodiaŭ la tago de kreaĵaro estas festata en la urboj de tuta Germanio. ACK kuraĝigas ĉiujn germanajn kristanojn festi ĉi tiun tagon kaj ĝi publikigas proponojn por la diservoj kaj aldonan materialon antaŭ septembro, por ke homoj povu uzi ĝin por plani festadon.

Alia temo, al kiu la Konsilantaro de eklezioj dediĉis multe da tempo kaj diskuto estas la temo de la bapto. En la jaro 2007 dek unu membro-eklezioj subskribis interkonsenton pri la reciproka agnosko de la bapto. Kvin membroj de la Konsilantaro de eklezioj, interalie menonitoj kaj baptistoj, ne povis subskribi ĝin. Ekde tiam ACK daŭre laboras pri la temo de la bapto. Pri ĉi tiu temo oni diskutis dum la Ĝenerala asembleo de ACK kaj en marto 2014 okazis publika konferenco. ACK konsiliĝas pri la sama temo kun la finna ekumena konsilantaro.

La artikoloj 10 kaj 11 de la *Charta Oecumenica* rekomendas intensan dialogon kun reprezentantoj de la juda kredo kaj ili kuraĝigas renkontiĝojn inter kristanoj kaj islamanoj.

Laŭ ĉi tiuj rekomendoj ACK kunlaboras kun unu juda kaj du islamaj organizoj en la iniciato nomita “*Weißt du, wer ich bin?*” (“Ĉu vi scias, kiu mi estas?”). Ĉi tiu iniciato proponas konsilojn kaj financon subtenon por kuraĝigi homojn de ĉiuj tri kredkonfesoj ekkoni unu la alian kaj labori en komunaj agadoj. Juna islama virino estis dungita por la kunordigo de ĉi tiu strebo. Germanaj kaj eŭropaj ŝtataj institucioj subtenis la projekton.

ACK pripensas la dokumenton „Kristana atesto en la mult-religia mondo“ kaj fondis grupon por kunordigi laboron pri ĉi tiu temo. En la jaro 2014 okazis konferenco, kiu donis al la membro-eklezioj de ACK kaj la Evangeliana Alianco (EA) eblon diskuti pri aferoj rilatantaj ateston kaj interreligian dialogon. Sekve EA kaj ACK starigis pli proksimajn rilatojn kaj EA petis esti observanto en ACK.

Ekumenaj defioj

Unu el la ĉefaj ekumenaj defioj en Germanio estas konservado de forumo, en kiu la eklezioj, kiuj estas laŭnombre pli malgrandaj, povu renkontiĝi kun la du grandaj eklezioj. La romkatolika eklezio kaj EKD estas proksimume sam-grandaj kaj disponas pri la samaj rimedoj. Pro tio ilia kunlaboro estas natura kaj rilatas al tre diversaj temoj – ĉio ekde inter-eklezia geedziĝo ĝis demandoj koncerne la rilaton inter ŝtato kaj eklezio. Tamen ofte ili kunlaboras nur inter si. Sekve aliaj eklezioj kaj eĉ ACK ofte ne povas diri ion en la ekumenaj aferoj. Unu el la ĉefaj celoj de ACK estas ebligi kaj kuraĝigi multflankan dialogon kaj kunlaboron, ĉar en Germanio estas pli ol du eklezioj.

Alia defio estas la frustrigo, kiun multaj sentas, speciale tiuj, kiuj longan tempon laboris, sed ili ne vidas progreson en la ekumenaj aferoj. Ĉi tiu frustrigo estas akre sentatata, se temas pri la komuna Vespermanĝo de la Sinjoro trans ekleziaj limoj konata kiel eŭkaristia kundivido. En Germanio estas multaj geedzaj paroj, kiuj apartenas al diversaj eklezioj. Ili ne povas ricevi sanktan komunion kune, sed multaj ankaŭ pensas, ke la ekumena movado devus alporti pli da fruktoj ol okazas nun. Ili estas malkontentaj, kiam ili vidas stagnadon anstataŭ kuraĝaj paŝoj antaŭen.

Multaj homoj en Germanio hodiaŭ ne havas realan konon de la kristana kredo kaj ŝajnas, ke ili ne volas kompreni aŭ akcepti ĝin. Se la eklezioj prenas serioze sian mision “iri al ĉiuj nacioj kaj fari disĉiplojn” (Mt 28, 19), dialogo kun ĉi tiuj homoj devus esti ilia prioritato. Anstataŭ individua solvo de ĉi tiu defio la eklezioj devus solvi ĝin kune, lerni de siaj spertoj kaj kuraĝigi unu la alian. La koncentriĝo je ilia komuna kredo povas plifortigi la rilaton inter la eklezioj. Komuna anonco de kristana kredo en komprenebla maniero povas gvidi la ekleziojn al pli profunda kompreno de ilia propra kredo. La 500-a datreveno de la reformacio estas bona okazo por rememorigi la publikon – kristanojn kaj nekredantojn – kio estas fakte kerno de la kristana kredo. Dia amo en Kristo por ni homoj kaj por la tuta kreaĵaro. Tial la eklezioj en Germanio decidis fari el ĉi tiu datreveno la feston de Jesuo Kristo (“*Christusfest*”).

Ĉi tiu teksto estas eldonita je respondeco de la Konsilantaro de eklezioj en Germanio (ACK).

KELKAJ GRAVAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

ĉ.1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezio

1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit)

1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“

1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj

1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto

1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson

1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto

1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“

1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono

1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj

1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21)

1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco

1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno

1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)

1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis ekumena grupo el Aŭstralio

1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando

1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)

2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita

2008: en la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj

2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

SEMAJNO DE PREĜADO POR LA KRISTANA UNUECO TEMOJ 1968-2014

En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj.

1968: Por laŭdo de Lia gloro (*Efe 1,14*)

1969: Vokitaj al libereco (*Gal 5,13*) (Prepara kunsido en Romo, Italio)

1970: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (*1 Kor 3,9*)

(Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)

1971: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (*2 Kor 13,13*)

1972: Novan ordonon mi donas al vi (*Joh 13,34*) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1973: Sinjoro, instru nin preĝi (*Luko 11,1*)

(Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)

1974: Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (*Fil 2,1-13*)

(Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1975: La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (*Efe 1,3-10*)

(Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1976: Ni estos similaj al li; (*1 Joh 3,2*) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas

(Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)

1977: Kune elteni en espero (*Rom 5,1-5*)

(Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)

1978: Jam ne fremduloj (*Efe 2,13-22*) (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)

1979: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (*1 Pet 4,7-11*)

(Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1980: Venu via regno (*Mat 6,10*)

(Materialo de ekumena grupo en Berlino, GDR, prepara kunsido en Milano)

1981: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (*1 Kor 12,3b-13*)

(Materialo de Graymoor Fathers, Usono – prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1982: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (*Psa 84*)

(Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)

1983: Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (*1 Joh 1,1-4*)

(Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny (Bossey), Svislando)

1984: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (*1 Kor 2,2 kaj Kol 1,20*)

(prepara kunsido en Venecio, Italio)

1985: De morto al vivo kun Kristo (*Efe 2,4-7*)

(Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)

1986: Vi estos miaj atestantoj (*Ago 1,6-8*)

(Materialo el Jugoslavio/Slovenio, prepara kunsido en Jugoslavio)

1987: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (*2 Kor 5,17-6:4a*)

(Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)

1988: La amo de Dio elĵetas timon (*1 Joh 4,18*)

(Materialo el Italio - prepara kunsido en Pinerolo, Italio)

1989: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (*Rom 12,5-6a*)

(Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)

1990: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kedu (*Joh 17*)

(Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)

1991: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (*Psa 117 kaj Rom 15,5-13*)

(Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)

- 1992:** Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (*Mat 28,16-20*)
(Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)
- 1993:** Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (*Gal 5,22-23*)
(Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)
- 1994:** La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (*Ago 4,23-37*)
(Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)
- 1995:** Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (*Joh 15,1-17*)
(Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)
- 1996:** Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (*Apo 3,14-22*)
(Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)
- 1997:** Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (*2 Kor 5,20*)
(Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)
- 1998:** La Spirito helpas nian malfortecon (*Rom 8,14-27*)
(Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)
- 1999:** Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (*Apo 21,1-7*)
(Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)
- 2000:** Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (*Efe 1,3-14*)
(Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna)
- 2001:** Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (*Joh 14,1-6*)
(Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)
- 2002:** Ĉe Vi estas la fonto de vivo (*Psa 36,5-9*)
(Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)
- 2003:** Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj (*2 Kor 4,4-18*)
(Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)
- 2004:** Mian pacon mi donas al vi (*Joh 14,23-31*)
(Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Sicilio)
- 2005:** Kristo, unika fundamento de la Eklezio (*1 Kor 3,1-23*)
(Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestany, Slovakio)
- 2006:** Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (*Mat 18,18-20*)
(Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)
- 2007:** Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (*Mar 7,31-37*)
(Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges, Francio)
- 2008:** Preĝu senĉese (*1 Tes 5, 12a.13b-18*)
(Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)
- 2009:** Ke ili fariĝu unu en Via mano (*Eze 37,15-28*)
(Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)
- 2010:** Vi estas atestantoj pri tio (*Luk 24,48*)
(Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)
- 2011:** Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (*Ago 2,42*) (Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)
- 2012:** Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (*1 Kor 15, 51-58*)
(Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)
- 2013:** Kion la Sinjoro postulas de ni (*Miĥ 6, 6-8*)
(Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)
- 2014:** Ĉu Kristo estas dividita? (*1 Kor 1,1-17*)
(Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo, Kanado)
- 2015:** „Donu al mi trinki“ (*Joh 4,7*)
(Prepara materialo el Brazilo, kunsido en São Paulo)
- 2016:** „Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio“ (*kp. 1 Pet 2,9*)
(Prepara materialo el Latvio – kunsido en Riga)